

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Hobio  
Artaĵoj el la  
natio

## En la regno de faraonoj

Ampleksa ekspozicio  
pri Egiptio

TURISMO

Katedralaj  
trezoroj  
de Speyer

## Prezoj

		MONATO		LA JARO
		surf.	aere	aere
Aŭstralio	AUD	72	81	11
Aŭstrio	EUR	39	44	5
Belgio	EUR	39	44	5
Britio	GBP	29	32,6	3,6
Danio	DKK	298	336	38
Finnlando	EUR	39	44	5
Francio	EUR	39	44	5
Germanio (ok.)	EUR	39	44	5
Germanio (or.)	EUR	32	37	5
Hispanio	EUR	32	37	5
Irlando	EUR	39	44	5
Islando	EUR	39	44	5
Israelo	EUR	32	37	5
Italio	EUR	39	44	5
Japanio	JPY	5900	6760	860
Kanado	CAD	67	76	9
Luksemburgo	EUR	39	44	5
Nederlando	EUR	39	44	5
Norvegio	NOK	340	384	44
Nov-Zelando	NZD	83	94	12
Pollando	PLN	70	90	20
Portugaliao	EUR	28	33	5
Sud-Afriko	EUR	32	37	5
Svedio	SEK	369	418	49
Svislando	CHF	65	74	9
Usono	USD	47	53	8

### Retaversio 60% de la surfaca tarifo

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33; retpoŝto: [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be).



#### 1. Rimedoj tute senkostaj:

- 1.1. Se vi havas kurantan konton ĉe FEL, kiu estas kredita, simple petu ke ĝi estu debetita.
- 1.2. Se vi havas konton ĉe UEA, kiu estas kredita, sendu ĝirilon. La kontokodo de Flandra Esperanto-Ligo ĉe UEA estas fela-x.
- 1.3. Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran bankĉekon. En tiu okazo la valuto devas esti la usona dolaro.

#### 2. Rimedoj kiuj estas senkostaj en la alvenlando (Belgio) sed eble kostas en la forirlando (via lando):

- 2.1. Petu vian poŝtofiĉejon pri internacia poŝtmandato je nomo de Flandra

## Al kiu pagi?

al via landa peranto

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: [esperfed@ans.com.au](mailto:esperfed@ans.com.au)

**Aŭstria:** AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: [esperanto.aem@chello.at](mailto:esperanto.aem@chello.at)

**Belga:** FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be).

**Brazila:** BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília (DF). R: [bel@brnet.com.br](mailto:bel@brnet.com.br).

**Britaj:** Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: [paul@esperanto.freeseerve.co.uk](mailto:paul@esperanto.freeseerve.co.uk).

**Ĉeĥa:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice R: [vlada\\_hasala@iol.cz](mailto:vlada_hasala@iol.cz).

**Ĉina:** *El popola Ĉinio*, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing. R: [libroservo@china-report.com](mailto:libroservo@china-report.com).

**Dana:** Revuservo de DEA, c/o Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800 Nykøbing F, Danio. Tel.: +45 54 82 95 86/PTel.: +45 40 53 25 06. Rete: [frederikeriksen@post.cybercity.dk](mailto:frederikeriksen@post.cybercity.dk).

**Estona:** Virve Ernits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.

**Filipina:** Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: [fam.fuehrer@t-online.de](mailto:fam.fuehrer@t-online.de)

**Finnaj:** Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647.

• *Oy Mendoservo Ak*, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.

**Francaj:** UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: [esperanto-france@esperanto.org](mailto:esperanto-france@esperanto.org)

• Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz. R: [eo-metz@osiek.org](mailto:eo-metz@osiek.org)

**Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: [smalul86150@aol.com](mailto:smalul86150@aol.com) • S-ino Consuelo Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (Konto: 141471-603 ĉe Postbank Frankfurt am Main, BLZ 500 100 60. R: [fam.fuehrer@t-online.de](mailto:fam.fuehrer@t-online.de) • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxonstraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: [RoBo.ESPERO@t-online.de](mailto:RoBo.ESPERO@t-online.de).

**Hispana:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2ª izda., Santander (BBVA: 0182-3800-33-0203548535).

**Hungara:** Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: [akovacs@cosoft-bt.com](mailto:akovacs@cosoft-bt.com).

**Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

**Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.

**Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

**Japanaj:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: [jei@mre.biglobe.ne.jp](mailto:jei@mre.biglobe.ne.jp).

**KLEG,** Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: [kleg@mvf.biglobe.ne.jp](mailto:kleg@mvf.biglobe.ne.jp).

**Kataluna:** KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

**Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: [kanadano@hotmail.com](mailto:kanadano@hotmail.com)

**Korea:** Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: [keast@soback.komet.nm.kr](mailto:keast@soback.komet.nm.kr). • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: [esperant@unitel.co.kr](mailto:esperant@unitel.co.kr).

**Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto [miaumiau@sol.racsa.co.cr](mailto:miaumiau@sol.racsa.co.cr).

**Kroataj:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: [mbelosev@public.SRCE.hr](mailto:mbelosev@public.SRCE.hr) • Viŝnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: [orbispictus@iol.it](mailto:orbispictus@iol.it).

**Latva kaj litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: [stralaim@takas.lt](mailto:stralaim@takas.lt).

**Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: [esperlu@geocities.com](mailto:esperlu@geocities.com)

**Nederlandaj:** Libro-Servo Esperanto Nederland, Mamixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278).

• UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).

**Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: [esperanto@online.no](mailto:esperanto@online.no)

**Nov-Zelanda:** Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: [gwenda.s@ihug.com.nz](mailto:gwenda.s@ihug.com.nz)

**Portugala:** PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C -A, P-1500 Lisboa. R: [ap.esperanto@clix.pt](mailto:ap.esperanto@clix.pt)

**Pola:** *Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danula Leyk*, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.

**Rusa:** Halina R. Gorecka, ab. ja 1248, RUS-236039 Kaliningrad, Ruslando. R: [sezonoj@yandex.ru](mailto:sezonoj@yandex.ru)

**Slovenaj:** Viŝnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: [orbispictus@iol.it](mailto:orbispictus@iol.it). • Jovan Mirković, Mirna 5, SLO-2000 Maribor. R: [j.mirkovico@siol.net](mailto:j.mirkovico@siol.net)

**Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: [cbeckford@froomail.absa.co.za](mailto:cbeckford@froomail.absa.co.za)

**Svodaj:** Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

**Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schloedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

**Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: [olna@esperanto-usa.org](mailto:olna@esperanto-usa.org)

**Venezuela:** J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: [jobachrich@hotmail.com](mailto:jobachrich@hotmail.com)



Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

2.2. Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, eŭroj, tratitan je belga banko. Se la bankĉeko ne estas tratita je belga banko, aŭ se ĝi estas en alia valuto ol EUR, aldonu la egalvaloron de 10,5 EUR.

2.3. Petu vian bankon pagi al KBC Antwerpen Belgio, SWIFT-kodo "KREDBEBB", por konto 402-5510531-55.

2.4. Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili estas akireblaj en la plimulto de la poŝtofiĉejoj de la mondo. Unu kupono, nur maldekstre stampita de la poŝtofiĉejo, aŭ tute ne stampita, valoras 0,79 EUR.

#### 3. Rimedoj kiuj kostas en la alvenlando:

### aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

- 3.1. Se vi posedas kreditkarton Eurocard, Visa, Access, Fujicard aŭ Mastercard, eblas pagi citante la numeron kaj la validadon de la karto. Tiuj kiuj volas uzi PGP-ĉifradon por sendi la donitaĵojn, povas peti la publikan ŝlosilon de FEL per simpla ret-poŝto. De pagoj per kreditkarto subtrahiĝos 0,62 EUR + 2,25% pro administraj kostoj.
- 3.3. Se vi havas poŝtĉekkonton, vi povas pagi al konto n-ro BE66 0000 2653 3843 de Flandra Esperanto-Ligo. Aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj.

Por limigi la bankkostojn, vi povas pagi pli altan sumon. La tro pagita mono eniros konton vian, pri kiu vi povas disponi por estontaj mendoj.




Estimataj gelegantoj,

**E**n 2002 nia revuo eniros jam sian 23an jaron. Do ĝis la 25-jariĝa jubileo mankos nur du dekduoj da monatoj (aŭ MONATOJ), sed ĉu mi rajtas esperi, ke ni eltenos ĝis tiu ronda cifero? Ne estas multaj nemovadaj Esperanto-gazetoj, kiuj sukcesas atingi tian aĝon. Nuntempe estas ekzemple la ajnista La Kancerkliniko, kiu ĵus festis sian 25-jaran jubileon (gratulon!), kaj la literatura Fonto, kiu estas iomete pli juna ol nia magazino. Tiuj ĉi revuoj dependas de la merkato, kontraste al movadaj gazetoj, kies abonantoj estas precipe membroj de asocioj; tiujn legantojn oni ne devas konvinki per enhavo. Nian revuon aĉetas nur homoj, kiuj trovas en ĝi sufiĉe da valora legaĵo por elspezi sian monon kaj kiuj uzas la lingvon internacian ne nur por movadumi. Vi estas inter ili, sed certe estas multaj aliaj, kiuj tute ne scias pri tia praktika aplikado de Esperanto. Se vi konas tiajn, vi povas helpi nin trovi eventualajn novajn abonantojn por kompensi la perdojn pro maljuniĝo kaj morto de abonantoj. Ŝajnas al mi, ke precipe la novaj generacioj, kiuj opinias, ke Esperanto estas ĉefe aŭ preskaŭ nur afero de tutmonda tera teksaĵo, ofte tute ne konscias pri la valoro de presita multfaceta magazino. Se ĉiu el vi gajnas minimume unu plian abonanton, ni atingos la 25-jaran jubileon senprobleme. Varbante novajn legantojn, tamen ne forgesu renovigi vian propran abonon por 2002! Urĝas nun, se vi ne volas riski interrompon de regula alveno de viaj ekzempleroj (aŭ de viaj retmesaĝoj, se vi mendis la retan version) dum la venonta jaro.

Sincere via Stefan MAUL

<b>leteroj</b> .....	4
<b>el mia vidpunkto</b> .....	5
- Ovo kaj kokino	
<b>politiko</b> .....	6
- NORVEGIO: Triumfas tedulo	
- NORD-IRLANDO: Malsankta kruco	
- PREMATAJ POPOLOJ: Batante tamburon por homaj rajtoj	
<b>ekonomio</b> .....	9
- KONGO (D.R.): Nova liberalismo, nova kunlaboro ▶	
- BALTIO: Litovio progresas	
<b>moderna vivo</b> .....	10
- AŬSTRIO: MuKva inaŭgurita!	
- Netoleremaj patriotoj	
- BENINO: Konduku min policejen	
- RUSIO: Tragika morto de golulo	
- OLIMPIKOJ: Amikecaj ludoj	
- UKRAINIO: Pape – sed ne tute pace	
<b>spirita vivo</b> .....	12
- FINNLANDO: Je kio ni kredas? ▶	
- Ŝanĝiĝanta aspekto de kristanismo	
<b>lingvo</b> .....	14
- LA ŜETLANDA: Malaperanta lingva heredaĵo	
<b>hobio</b> .....	16
- FINNLANDO-FRANCIO: Lignaj naturartaĵoj ▶	
<b>turismo</b> .....	18
- GERMANIO: Katedralaj trezoroj en nova aranĝo	
<b>scienco</b> .....	21
- ORGANTRANSPLANTADO: - La litova prezidanto donacis siajn organojn	
- Ĉu fordoni siajn organojn?	
- Cerba lezo pro telefonaparato	
<b>arto</b> .....	22
- AŬSTRIO: Pri la antikva arto en Egiptio (Kovrilo)	
<b>novelo</b> .....	24
- de Pejno Simono: Tagmeze en Tunizo	
<b>libroj</b> .....	28
<b>enigmoj</b> .....	32
<b>informoj de l' MONATO</b> .....	33
<b>ŝerco &amp; satiro</b> .....	34



## Delikata amo

„Ĉu ili estas amnoveloj” (MONATO, 2001/6, p. 20) sin demandas la recenzanto János Sárközi. Certe jes! Kiel avertas la tradukinto Grigori Arosev, ili disradias etoson „percepte-intuician”, sed la recenzanto perceptas nenion. Estus pli bone ne aperigi recenzon de iu, kiu konfesas, ke li „ne finlegus la libron, se li ne devintus skribi recenzon pri ĝi”. Eble li pli kompetentus en recenzo de spicita amor-afero. Mi ĉagreniĝas pensante pri la reago de la tradukintoj, kiuj elektis tiujn novelojn, kiuj elvokas delikatajn, subtilajn sentojn „lasante la korpon kovrita”.

Hélène FALK, Belgio

## Longa kaj sana vivo

La artikolo de Hori Jasuo (MONATO, 2001/7, p. 15) pensigas min pri germana kuracista ŝerco:

Paciento: „Mi deziras fariĝi 125-jara. Tial mi nek fumas nek drinkas nek seksumas!”

Kuracisto: „Kial do vi deziras tiel longe vivi?”

Mi mem estas naturmetoda kuracisto kaj nefumanto. Mia eksedzino estas forta fumantino kaj ni ambaŭ ŝatas drinki. Tial, kiam malgranda, ankaŭ nia filino deziris tion. Nenia problemo al mi: mi gustumigis al ŝi kaj cigaredon kaj alkoholon. Jam ĉe la unua spiro kaj la unua gluto mia filino komprenis kiom malbongustaj estas cigaredoj kaj alkoholo. Nun ŝi estas 17-jara junulino, kiu nek fumas nek drinkas.

Malpermesoj estas la plej maltaŭga maniero konvinki homojn ne fari ion. Malpermeso ĉiam provokas kontraŭagon kaj – kiel koncerne narkotikaĵojn – eĉ krimojn. Malpermesoj ankaŭ kontraŭas la ideon de demokratio, kiu ja signifas ne la rajton de la plej multaj (ekz. fumantoj aŭ nefumantoj), sed la plurecon de la opinioj. Ŝtato kiu deziras malpermesi ĉion fariĝas diktaturo, eĉ se oni povas koncedi bonan volon.

Ni devas akcepti ke la vivo ĉiam estas vivdanĝera, ĉu oni fumas, drinkas aŭ ne. Se ni taŭge edukas niajn infanojn, la problemoj malaperas tute sen kontraŭdemokratiaj malpermesoj. Ni do unue serĉu la kernon de la problemoj en ni mem. Japanio do tute ne estas progresema lando rilate fumadon. Same kiel la plej multaj landoj de la Eŭropa Unio ĝi estas krustiĝinta pro tro da burokrateco kaj tro da malpermesoj.

Fine ni konsideru la eldiron de fama eŭropa naturmetoda kuracisto Paracelso

(antaŭ 500 jaroj): „kio estas veneno dependas de la dozo.” Tiel estas ankaŭ koncerne tabakon, kiu ekz. preventas tuberkulozon, kaj alkoholo, kiu plibonigas la trasangadon de la korpo.

Harald SCHICKE, Germanio

## Terorismo (1)

Nenio pravigis, pravigas, pravigus, pravigu aŭ pravigos terorismajn agojn. Mi ne nur parolas pri la afero okazigita en septembro de teroristoj en Usono ... Mi parolas pri atombomboj ĵetitaj sur Japanio, pri koncentrejoj, ktp...: ĉiaj estis terorismaj agoj, ĉu ne? Ĉu oni bezonas esti alte inteligenta por kompreni, ke paco, progreso, feliĉo kaj riĉeco ne estas atingeblaj pere de perforto, aŭ terorismo? Raita Pyhälä (MONATO 10/2001, p. 4) parolis pri „inteligenta ago” ... Ĉu ekzistas inteligenteco en la perforto, aŭ la perfort-agoj estas nur malboneco? Ĉu ne estas inteligenta ĉiu, kiu sidiĝas kaj diskutas ekvilibre ĝis la atingo de la solvo por la solvenda problemo? Mi tre ŝatus aŭdi aŭ legi opiniojn mondajn pri tio...

Saulo Salgado WANDERLEY, Brazilo

## Terorismo (2)

Mi ne devis legi la artikolon de Stefan Maul *La ekstrem-potenco* (MONATO 9/2001 p. 5), por ke la proverbo „Kion vi semas, tion vi rikoltos” tuj trafu mian penson, vidinte la terorismajn atakojn en Novjorko. Usono ricevis lecionon, kiun ĝi meritis. Mi dubas nur, ĉu ĝi lernos el tio. Ŝokis min la publika reago. Ĉu estas fino de la mondo, kiam kelkaj konstruaĵoj kolapsis kaj nuraj 5000 homoj mortis? Amase oni organizis publikajn funebraĵojn, monkolektojn, diservojn. Naturkatastrofoj en la tria mondo kun multoble pli da viktimoj neniam elvokas tian funebrecon, ĉar tie ja mortas nuraj malriĉaj triamondanoj. Groteske estas (kaj mi denove pensas pri la proverbo), ke tiuj afganaj teroristoj, kiuj laŭdire respondecas pri la atako, estis en la 80aj jaroj nomataj „batalantoj por libereco” kaj de Usono finance subtenataj.

Jiří PROSKOVEC, Germanio

## Terorismo (3)

Grandegan dankon al Stefan Maul pro la precize esprimita vero pri la fanatikaj religioj (MONATO 10/2001, p. 5). Ĉu aliaj religianoj estas pli realaj kaj ruzaj atingante sian paradizon – ne nur virgulinan – nun sur la tero? Ili vendas armilojn kaj teknologiojn, al la fanatikuloj,

por gajni monon, monon, monon. Poste ili estas ŝokitaj, se ilia propra armilaro murdas ilin. Kio okazos, se virgulinaj ne estos? Kial la gvidantoj ne rapidas al la paradizo, nur sendas aliajn „fratojn”? Kial patrinoj naskas infanojn por certa morto? Kial ili ne ĉesas naski murdistojn? Oni povas tiel pensi pri la needukita civito. Tamen kion oni pensu pri okcidente civilizita Irlando? Kial al la lernejo la infanoj devas iri tra atakata strato, ĉu ne estas prudente loki la lernejon en sia kvar-talo? Ĉu oni devas arogante provoki per la marŝo la homojn, kiujn iam humiligis la historio? Kiuj estas la organizantoj-frenezuloj, ĉu maturaj homoj, gepatroj? Kiom valora estas la laboro de ambaŭflankaj pastroj, kiam ili ne povas instrui siajn ŝafojn pri Dekalogo?

Danuta KOWALSKA, Pollando

## Terorismo (4)

Kvankam Raita Pyhälä bildigas iom koŝmare, kaj eble iom provoke, sian kontraŭ-okcidentan kaj terorinklinan vidpunkton (MONATO 10/2001, p. 4), tiu ĉi entenas, almenaŭ ŝajne, ion pensigan. Ankaŭ mi revas pri Okcidento. Mi ĝin imagas ĉiam pli interkruciĝinta kaj apogita de la kapitaloj de la mondo ne-okcidenta, kiuj jam okupas efikan pozicion en multnaciaj entreprenoj kaj en ĉiukontinentaj borsoj. Ĉu tiuj entreprenoj funkcias sen tiaj kapitaloj? Mi ĝin imagas malpli streĉe serĉanta profitojn, kaj por tion fari, malpli engaĝiĝinta en la produktado (malpli da elektra energio, malpli da grenoj aŭ sojo, malpli da teknikaĵoj, ktp). Malpliigante siajn profitojn, ĝi certe kontribuas malpliigi la evolulandajn malavantaĝojn! Mi imagas la civitanojn de evoluintaj landoj (ĉu ĉiuj okcidentaj?) unuope kaj amase premantaj siajn politikistojn, por ke per novaj impostoj kolektiĝu la mono necesa por liberigi je ŝuldoj la evoluantaj landoj. Mi estas revanta, ke mi malkovris la kaŭzon de ĉiuj malbonoj ...

ZECCHIN Armando, Italio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton.

Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

monato-leteroj@fol.esperanto.be

# Ovo kaj kokino

Dum la jeto jetis tunojn kaj tunojn da karbonidaj gasoj inter la bluoj de atlantika oceano kaj de la firmamento, mi enprofundiĝis en pensojn de Hubert Reeves [ubér rivs] per la libro „Malicorne” (Mia unukornulejo). Inter aliaj fantasmagoriaĵoj de mitologiaj meditadoj la aŭtoro reprenis la ŝajne senlirejan problemon de la ovo kaj la kokino.

Post surteriĝo de la avio, mi stircele eksidis en aŭton kaj traveturis, sen kroĉita sekurrimeno, kun sento de libero, Francion, Germanion, Aŭstrion ĝis Hungario kaj Kroatio ... por ĉeesti la tieajn kongresojn, por pritrakti la problemon de „ovo kaj kokino”. Senkulpigiu min se vi ne legos raporton pri tio, sed tiel estis.

## Kolizio de l' vortoj

La realo estas sendependa de la lingvo, indifera rilate al la vortoj kies signifo povas enteni multajn nociojn. Ne malofte tiuj nocioj ĝuste kolizias kun la realo. La vortoj de la poetoj, por esprimi la samon kiel teknikistoj, estas tute alimaniere ordigitaj. Ekzemple, nia „teknikisto” Zamenhof verŝajne iam diris: „Ni kreis novan lingvon por praktika uzo tutmonda.” Por transdoni la saman ideon li poete en „La Espero” lanĉis la senfinan refrenon: „En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko ...” La mistika „sento” same kiel la „forta voko” ne tradukas la ideon „por praktika uzo tutmonda”; tial en sia strategio UEA metas la praktikan uzon de Esperanto (ne vera lingvo, diras la laborplano) en trian lokon, ĉar ĝi ne scipovas distingi la rolon de la ovo de la rolo de la kokino. Gravas praktikado (la ovo), ne la propagando, instruado (la kokina instrumento).

## Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj

Estas vero, ke per bona retoriko oni povas eviti tro fortajn koliziojn inter vortoj. Ĉe traktado de la ĉi-supra temo, la „majstro” pri konvinka vortjonglado H. Tonkin tamen ne evitis, ke la ovo (kulturo de dialogo) restis en dua loko; la kokino (dialogo inter kulturoj) daŭre elstaris per la konservado de establitaĵoj, de ĉiuj bibliecaj monologoj, kiuj regas nian mondon en unika forta voko. Mia klopodo loki la ovon en unuan pozicion ekvenigis rapidajn reagojn de la kokinuloj.

Evoluismo ne kongruas al homaj mensoj. La homoj ne kapablas koncepti aliajn ekzisto-formojn ol la ĝisnunajn, nuntempajn determinismojn kun helpo de sanktaj historioj. Por la nocio pri infinito

aŭ eĉ nur 15 miliardoj da jaroj nia intelekta kapablo stumblas kaj ne sukcesas eliri el la cirklo ovo-kokino-kokino-ovo.

## Eliro de l' cirklo

En verko „La bakteria universo” aŭtoroj Margulis kaj Sagan diras, ke la unuaj vivantaj ĉeloj reproduktiĝis per si mem, sen seksa kuniĝo aŭ ovonasko. Poste, du partneroj deponis siajn genojn en iu sama medio, la ovo. Tio estas la pragoj de la kokino kaj la koko kiuj produktas ovojn, ne por ke la homoj faru simplan omleton sed por reproduktado de la specio post eventuala kovado. H. Reeves memorigas, ke post centoj da milionoj da jaroj la unuaj surteraj vivuloj estis flugantoj, poste aperis la reptilioj, sekvis amfibioj kaj post pliaj milionoj nature venis la fiŝoj. Observu ke ĉiuj

naskas ovojn. Estas la kuniĝo per sekseco kiu venigis la ovojn.

La mambestoj, inkluzive de la inteligenta (ĉu?) homo, kies limigitaj kapabloj estas pli detruaj ol konstruaj, ankaŭ ovonaskas, kvankam procezo kaj procedo estas iom

aliaj pro la fakto, ke la ovo koviĝas en la organismo de la mambesto post seksa interveno rekte en tiu ĉi organismo. Resume la ovo estas la fundamenta



elemento de niaj vivo, reprodukto kaj multiĝado. Kiom bedaŭrinde, ke per miriadoj da homaj ovoloj oni ne povas fari omleton spicitan de spermatozooj! Nur tiel ni forgesus la kokinon.

## Amuza klonado

Ĉar estas la kokino, kiu nature ellasas la ovojn, ni ne plu bezonas misuzi nian mincan inteligentcon por provi komprenon pri praaj okazintaĵoj de antaŭ pli ol kelkaj jarmiloj; ĉu ni ne havas historion pri la dinosaŭroj por nia distro? Des pli ke nia streta mondo estis farita en 7 tagoj de tiuj superaj fortoj kiujn oni nomas dio. Kiom facile estas kompreni la kreadon de nia tre kara Eva! Ĉu nuntempe ne estas science komprenebla kaj farebla la klonado el simpla ripo de Adamo?

La realo malfacile ligiĝas al esprimo de la vero. Tion prezentis fama psikanalizisto Jacques Lacan [jak lakán] iel poezie sed kontraste per la ĉi-subaj vortoj: „Mi ĉiam diras la veron, ne entute, ĉar ĝin diri entute oni ne sukcesas, mankas la vortoj. Estas ĝuste pro ĉi tiu neblo, ke la vero teniĝas al la realo.”

Gilbert LEDON




NORVEGIO

# Triumfas tedulo

Antaŭ du jaroj populara Jens Stoltenberg transprenis gvidan rolon en la norvega laborista partio (DNA) por levi ĝin al la nivelo de la pasinteco. Lastatempe, tamen, la social-demokratoj ricevis malpli ol 25 % en la parlamenta baloto kaj devis lasi la registaron al centra-dekstra koalicio.

Post la baloto en 1997 la laborista partio, akirinte 35 % de la mandatoj, rezignis la registaron, ĉefe ĉar la partiestro Thorbjørn Jagland jam antaŭ la baloto anoncis, ke DNA ne plu povis respondeci pri la registaro sen minimume 36,9 % de la voĉoj. Multaj ligis la malbonan rezulton al la netaŭgeco de Jagland kiel oratoro. Sekvis lin Jens Stoltenberg, sed la sorto de la social-demokratoj ne dependis de unusola homo. En la ĵus pasinta baloto DNA, kun 24,4 % de la voĉoj kaj nur 43 el 165 seĝoj en la parlamento, iĝis la granda malgajninto. Rezulte Stoltenberg cedis al koalicio de la konservativa, kristana kaj eta social-liberala partioj (H, Krf, V) kun subteno de la dekstremaj populistoj en la Progresiva Partio (Frp).



Jens Stoltenberg: malgajno.

modernigi la partion kaj adapti ĝin al la strukturaj ŝanĝiĝoj en Norvegio. La nuna rezulto montras, ke ĝi ne sukcesis. La malnovaj kernaj subtenantoj ne plu vidas ĝin kiel garantianto de socia sekureco kaj malaprobas la ampleksan privatigon efektivigitan sub DNA-regado. Aliflanke, la multaj bonstatuloj ne

plu vidas bezonon je komunaj sociaj solvoj kaj iras al pli dekstremaj partioj, kiuj promesas malpli altajn impostojn kaj plian liberecon kaj malburokratigon.

La balotantoj pli ol iam antaŭe vagas de partio al partio. Antaŭ jaro plej granda partio en la opinienketoj estis la Progresiva Partio (Frp) kun pli ol 35ona subteno. Ĝi rajdis sur protestondo kontraŭ burokratio kaj altaj impostoj, precipe la alta benzinprezo, sed kolapsis pro interna potenclukto. „Partiposedanto” Carl I. Hagen, gvidanto dum 23 jaroj, volis forpeli kandidatojn, kiuj esprimis sin tro rasisme kaj krude. Hagen jam dufoje forigis la seriozajn liberalistojn. Nun necesis igi la partion akceptinda kiel koaliciano por la konservativuloj kaj kristanoj per forigo de la plej „bruna” alo. Poste seks-skandalo draste faligis la publikan subtenon. Du junulinoj kulpigis la vicgvidanton kaj alian centran partianon pri seksperforto dum partiaj festoj.

## Privatigo

DNA dum la lastaj 15 jaroj provis

## La politika situacio en Norvegio

Nomo	Politika orientiĝo	Balotrezulto 2001	Komparoj 1997	Mandatoj 2001	Komparoj 1997
Laborista partio (DNA)	Social-demokratoj	24,4 %	-10,6 %	43	-2
Socialisma maldekstra partio (SV)	Socialistoj/verduloj	12,4 %	+6,5 %	23	+1
Centra partio (Sp)	Kamparaj interesoj	5,6 %	-2,4 %	10	-1
Kristana popola partio (Krf)	Konservativa, „kristanaj valoroj”	12,4 %	-1,3 %	22	-3
Maldekstro (V)	Social-liberaluloj	3,9 %	-0,6 %	2	-4
Dekstro (H)	Konservativuloj-liberalistoj	21,2 %	+6,9 %	38	+1
Progresiva partio (Frp)	Dekstremaj populistoj	14,7 %	-0,6 %	26	+1
Marborda partio (Kyst)	Interesoj de ĉemaraj regionoj	1,7 %	+1,7 %	1	+1



Stoltenberg (dekstre) kaj Jagland devis cedi al koalicio.

Evidentiĝis, ke la partiestraro jam delonge sciis pri la afero, sed nenion faris kaj eĉ estis rekte mensoginta al la televida publiko.

Falis Frp, leviĝis la preskaŭ forgesita Dekstra Partio (H). Ĝi stabile kreskis kaj pintis je pli ol 30ona subteno en

tos irita akcesoraĵo por la socialdemokratoj. SV forte kreskis la lastajn semajnojn antaŭ la baloto kiel fidinda defendanto de socia sekureco kaj celkonscia medipolitiko. Helpis ankaŭ, ke partigvidanto Kristin Halvorsen estis taksata venkinto de multaj televidaj debatoj.

junio. Kun 21 % de la voĉoj gvidanto Jan Petersen estis repagata pro sia insista argumentado por malpli altaj impostoj kaj pli bonaj lernejoj. Petersen, ofte mokata pro sia tedeco, iĝis la granda balota triumfanto.

### Televido

Aliflanke de la gamo triumfis ankaŭ la socialisma maldekstra partio (SV). Kun 23 mandatoj SV ne plu es-

Ĝuste la rolo de la amaskomunikiloj kaj pleje la televidaj debatoj ricevis atenton post la baloto. Neniam antaŭe televido rolis tiom grave por formi la tagordon kaj finfine influi la balotrezulton. Programgvidantoj volis „altan temperaturon” en la studioj, kio kaŭzis, ke multaj debatoj iĝis tute neinformaj kaj cirkecaj. RV (ekstrem-maldekstra balotkoalicio) plendis, ke ĝi perdis du mandatojn pro televida bojkoto. Nekontentis ankaŭ la aliaj malgrandaj kaj mezgrandaj partioj pro tio, ke estis diskutataj pli la eblaj registaraj koalicioj ol reala politiko.

La eta social-liberala partio „Maldekstro” fiaskis kaj perdis kvar deputitojn. Sed ĉar la kristanoj ne kuraĝas solaj eniri registaran koalicion kun la konservativuloj, ĝi tamen ricevos ministrojn en la nova registaro. Ĉu tio ankaŭ signifas, ke Kjell Magne Bondevik de Krf iĝos nova ĉefministro, estas tro frue diveni. Neklaras ankaŭ, ĉu la nova registaro estos vivipova, ĉar Krf kaj V ne subtenas la ampleksan impostforigon, per kiu gajnis la baloton H.

La ekstera mondo apenaŭ rimarkos la registaran ŝanĝon. Dekstro tre volas norvegan EU-membrigon, sed la du kunregantoj ne akceptos norvegan aliĝpeton ene de la venonta kvarjara periodo. **Baard HEKLAND**

## NORD-IRLANDO

# Malsankta kruco

**La elementa katolika knabina lernejo „Sankta Kruco” troviĝas en kvartalo de la nordirlanda ĉefurbo Belfasto, kie loĝas protestanta minoritato ĉirkaŭata de katolika majoritato.**

**J**am delonge tieaj protestantaj t.n. lojalistoj (t.e. lojalaj al la Unuiĝinta Regno, aŭ Britio) plendas pri la ĉesto de la katolikaj respublikistoj, kiujn ili akuzas pri atencoj kaj aliaj malamikaj agoj kontraŭ ili. Reciproke, la katolikoj/respublikistoj akuzas la protestantajjn najbarojn pri simila konduto.

En tiaj distriktoj, katolikoj ne estas bonvenaj sur stratoj, kie loĝas protestantoj, kaj inverse. Kiam aperas sur stratoj en tiuj „gettoj” homoj de rivala konfeso aŭ politika ideologio, perfortaj manifestacioj apenaŭ eviteblas. Tio estas parto de la normala vivo en kelkaj regionoj de Nord-

Irlando. En Ardoyne [adojn], la kvartalo, en kiu situas la lernejo „Sankta Kruco”, protestantoj timas, ke ilia komunumo estos glutita de kreskanta nombro de katolikoj, kaj ke, finfine, Nord-Irlando fariĝos parto de la Respubliko Irlanda – la plej terura premsonĝo de la uniistoj (subtenantoj de la unio kun Britio).

### Humiligo

Tio klarigas (kvankam ne pravigas) la konduton de protestantoj en Ardoyne, kiuj amase provis bari straton al katolikaj gepatroj, kiuj akompanis siajn infanojn lernejen. La ĉefenirejo de la lern-

ejo „Sankta Kruco” situas en la strato Ardoyne: la protestantoj insistis, ke la infanoj – inter 4- kaj 11-jaraj – eniru tra malantaŭa enirejo troviĝanta ekster la protestanta teritorio. Tio signifis ne nur pli longan piediradon sed ankaŭ, laŭ la katolikaj gepatroj, humiligon.

Observantoj (ne nur surloke sed ankaŭ televide) spektis furiozajn protestantojn minaci la gepatrojn kaj la teruritajn filinetojn, kriegante „bastardoj”, ŝetante botelojn, petardojn, eĉ perturbgrenadon, vundante policanojn kaj membrojn de la publiko. Kelkaj knabinetoj estis novaj lernantoj, spertantaj sian unuan lernejan tagon.

La atakoj kontraŭ etulinoj estis kritikataj, eĉ de kelkaj plej fervoraj lojalistaj gvidantoj; aliaj tamen kulpigis la gepatrojn, asertante, ke ili „uzis siajn infanojn por krei politikan manifestacion”. Kvankam la polico faris ĉion eblan por defendi la gepatrojn kaj infanojn, la spektaklo de multnombraj policanoj portantaj kontraŭtumultan ekipaĵon (bastonojn, kaskojn kaj ŝildojn) certe eĉ pli timigis la infanojn. **Garbhan MACAOIDH**

# Batante tamburon por homaj rajtoj

*Okazis inter la 31a de aŭgusto kaj la 7a de septembro en Durban, Suda Afriko, „Konferenco kontraŭ Rasismo, Rasa Diskriminacio, Ksenofobio kaj Aliaj Rilataj Netoleremaj Agoj”. Unu el la ĉefoj de la barata neregistara delegacio ĉe la konferenco estis s-ro N. Paul Divakar, la kunvokanto de la konsilantaro por homaj rajtoj de la dalitoj, aŭ „netuŝebluloj” – alivorte la tretataj, subpremataj popoloj, kiuj daŭre suferas rezulte de la kasta sistemo en Barato. Post longa, malfacila kampanjo la dalito-komitato barata kune kun dalitoj el Nepalo, Srilanko kaj Japanio sukcesis meti kaston sur la tagordon de la durbana konferenco. Antaŭ ol ekveturi al Suda Afriko, s-ro Divakar parolis ekskluzive kun MONATO-korespondanto A Giridhar RAO.*

„La kasta hororo estas dunivela: ne nur ŝoke perforta sed ankaŭ nekredible ĉiutaga. Pensu: vi ne rajtas ĉerpi akvon el la sama puto kiel altkastano; vi ne rajtas eniri altkastan templon; vi eĉ ne rajtas paŝi laŭ kelkaj stratoj en altkastaj kvartaloj, portante piedvestojn (vi devas ilin teni enmane). Plue vi ne rajtas trinki en publika teejo el la sama glaso kiel altkastano (oni donas aparte markitajn glasojn por via uzo) kaj kompreneble vi ne rajtas sidi sur la sama benko kiel altkastano. La barata registaro diras, ke tiuj ĉi fikutimoj estas tri mil jarojn aĝaj, kaj parolas pri ili, kvazaŭ ili estos kun ni tri mil pliajn jarojn.”

„Ni konsentas kun la barata registaro, ke kastismo kaj rasismo ne estas identaj. La barata registaro uzas tiun argumenton por kontraŭi la diskuton de kasto en iu ajn internacia forumo. Sed kastismo ja estas diskriminacio, kaj profunde netolerema. Same kiel raso, ankaŭ la kasto estas socia konstruaĵo. Ni ne estas ĉi tie por diskuti hermeneŭtikaĵojn!”

## Videbleco

„En Durban, nia ĉefa celo estos videbleco. Ni volas, ke la demando pri la homaj rajtoj de tiuj ĉi subpremataj popoloj estu diskutata en internacia forumo, por ke la barata registaro agu tuj por efektiviĝi leĝojn kontraŭ tia ĉi diskriminacio. La leĝoj jam ekzistas en la barata konstitucio.”

„La ĉefa leĝo por protekti la rajtojn de la dalitoj estas la leĝo el 1989: la akto pri Listigitaj Kastoj kaj Listigitaj Triboj (Krueligaĵoj). Sed la subleĝoj pri ĝia efektiviĝo ne estis deciditaj ĝis 1994. Eĉ poste, la leĝo estas simple ne efektivigata de la registaraj funkciuloj. En unu kazo,

juĝisto ekzamenis 60 kazojn dum 28 tagoj kaj nuligis 54 el ili.”

„Ni mem turnis nin serioze al la problemoj post la fifama murdo en la vilaĝo Karamchedu [karamĉedu], en Andhra Pradesh, en 1984. Dum tiu sekega somero, altkastanoj lavis siajn bubalojn en la sola akvujo dalita, kiu ankoraŭ enhavis akvon. Kiam la dalitoj protestis, la reago estis tuja: ses dalitoj estis murditaj. Ni esploris kaj

trovis, ke tiuj homoj estis ĉasitaj kiel bestoj, kaj mortigitaj per hakiloj kaj lancoj. Perforto kontraŭ dalitoj estas ĉiam akompanata de humiligo: en alia loko, antaŭ la murdoj, altkastanoj devigis dalitojn trinki urinon. Tia perforto ne similas al ‘normala’ perforto, kvankam la registaro ofte deziras pentri ĝin simple kiel malamon inter du grupoj.”

## Pensmaniero

„Tial ege malfacilas ŝanĝi la pensmanieron de altkastanoj. Restas por ni dalitoj multege da laboro. Nia laboro finiĝos, kiam dalitoj povos vivi libere kaj sekure kun la sama memfido, kiun ĝuas ĉiu alia civitano de la lando.”

*N. Paul Divakar batalas jam de 20 jaroj kontraŭ diskriminacio. Li diplomitiĝis pri statistiko kaj magistriĝis pri socio-laboro en Madraso (nun Ĉenajo) kaj nun loĝas en Hajderabado, ĉefurbo de la sudbarata subŝtato Andhra Pradesh [andra pradeŝ], Divakar, kune kun sia edzino Annie [ani], ambaŭ en siaj fruaj 40aj jaroj, organizas diversajn ne-registarajn organizaĵojn dalitajn sub la ombrela organizaĵo „Dappu” [dapu]. Dappu signifas rondan tamburon, kiu estas batata dum festoj kaj funebroj dalitaj.*





KONGO (D.R.)

# Nova liberalismo, nova kunlaboro

La antaŭa prezidanto, Laurent-Désiré Kabila, estis de la okcidentaj landoj rigardata kvazaŭ komunisto. Lia registaro ege intervenis en la ekonomio, i.a. fiksante la prezon de petrolo. Pro la malkreskantaj ŝtataj enspezoj kaj pro la interna milito (ekde aŭgusto 1998), la fundamentaj strukturoj de la lando ankoraŭ pli kadukiĝis kaj la inflacio altis.

## Pli libera politiko allogas investantojn

Post kiam Laurent-Désiré Kabila la 16an de januaro 2001 mortis pro atenco, lia filo Joseph Kabila iĝis prezidanto. Tiu longe vojaĝis tra la okcidentaj landoj por klarigi sian estontan politikon. Venis pozitivaj reagoj kaj multaj landoj deklaris sin pretaj por denove investi en Kongo. Utilis por tio ke multaj ministroj de la nuna registaro estas dungitoj de okcidentaj entreprenoj aktivaj en Kongo.

Grava decido estis la liberigo de la prezo de petrolo. Antaŭe kompanioj ne ŝatis liveri petrolon al Kongo pro la malmaltaj prezoj kaj estis manko de petrolo. Nun tiu krizo finiĝis, sed venis aliaj pro-



blemoj. La petrolprezoj kvarobliĝis. Multaj urbanoj ne plu kapablas pagi la transporton kaj devas piediri al sia laborejo. Malrekte la altaj petrolprezoj ankaŭ in-



Guy Verhofstadt anoncis la reprenon de la rilatoj inter historie ligitaj landoj.

fluas la prezojn de aliaj produktoj, kvankam ĝenerale la pli liberala politiko iom bremsas la inflacion.

## La belgoj revenas

Ekde 1989 la rilatoj inter Belgio kaj la iama kolonio Kongo ege malbonis. La tiama prezidanto Mobutu en 1989 malbone parolis pri la belga reĝo. Siaflanke, la belgoj kulpigis la armeon de Mobutu pri la amasbuĉo de studentoj en 1990 en Lumumbaŝo, la tria urbo de la lando. La rompo de preskaŭ ĉiuj rilatoj kaŭzis gravan ekonomian kaj socian krizon kaj izolis Kongon de la cetero de la mondo.

Okaze de la 41a datreveno de la sendependeco de Kongo, la 30an de junio 2001, la belga ĉefministro Guy Verhofstadt [ĥi vrhofstat] vizitis Kongon kaj anoncis la reprenon de la rilatoj inter ambaŭ historie ligitaj landoj. Fakte, jam kreskis la kunlaboro dum la pasintaj jaroj: de 21,5 milionoj da eŭroj en 1999 al 30 milionoj en 2000 kaj, laŭplane, ĝis 40 milionoj en 2001.

La postan tagon Verhofstadt ankaŭ havis kontaktojn kun ribelaj politikistoj en la urbo Kisangani.

Zandandu Ntomono ZOLA

## BALTIO

### Litovio progresas

Laŭ ĉiujare proklamata bonstata indico de Unuiĝintaj Nacioj (*Human Development Index*) de 162 ŝtatoj ĉi-jare Litovio instaliĝis en la grupo de bone disvolvitaj landoj. Al tiu grupo apartenas 48 ŝtatoj, inter kiuj Litovio estas 47a. Lastjare en tiu listo ĝi estis 52a, kaj en la jaro 1999 nur 62a.

La indico estas kombinita indikilo, kiu spegulas mezan enspezon por unu loĝanto, situacion de sanprotektado, vivdaŭron, klerigadon, klercon kaj popolan aĉetpovon.

Alia balta lando Estonio en la grupo de bone disvolvitaj landoj okupas la 44an pozicion. Latvio kontentiĝas per la 50a pozicio kaj ankoraŭ apartenas al la grupo de meze disvolvitaj landoj.

Inter 162 landoj la unua estas Norvegio kaj la lasta Siera-Leono. En la raporto substrekiĝas impona progreso de Egiptio, Indonezio, Suda Koreio kaj Portugalio.

LAST

AŬSTRIO

# MuKva inaŭgurita!

**Malfermiĝis en la aŭstria ĉefurbo la Viena Muzea Kvartalo – konata laŭ la germana mallongigo MuQua [mukva]. Ĝi situas iom ekster la centro de la urbo en barok-stila iama imperiestra ĉevalejo datumanta de la jaro 1725. Tie ekde 1921 troviĝis la Viena Internacia Foiro.**

**J**am 1987 estiĝis konkurso por alikonstrui la „Foiran Palacon” al muzearo. En 1991 translokiĝis la foiro en la orientan parton de Vieno. Laŭ la unua projekto aperis du turoj en la centra korto, kiuj tamen ne harmoniis kun la baroka fasado. La turojn oni aliplanis al du kuboformaj konstruaĵoj; la aliaj partoj de la palaco ĝenerale restis kiel antaŭ 300 jaroj.

En la somero de 2001 finfine inaŭguriĝis, parton post parto, MuQua. Oni priskribas ĝin kiel „unu el la dek plej grandaj kulturkompleksoj de la mondo, spektakla ligo inter historia kaj moderna arkitekturoj”. Fakte sur la seshektara areo troviĝas 20 muzeoj kaj

eventejoj, inkl. de la novkonstruita Ludwig-muzeo pri Moderna Arto, kun nigra bazaltŝtona fasado, en kiu videblas artaĵoj el la posedaĵo de la germana industriisto P. Ludwig; la ankaŭ novkonstruita Leopold-muzeo, ĉefe kun pentraĵoj el la 20a jarcento sed enhavanta ankaŭ la plej grandan kolekton de bildoj de Egon Schiele [ŝile]; Viena Arthalo, por montri nuntempan arton; plus diversaj laŭtemaj ekspozicioj, teatro kaj muzeo por infanoj.

Informoj en diversaj lingvoj trovblas rete sub [www.mqw.at](http://www.mqw.at) (Muzea Kvartalo); [www.mumok.at](http://www.mumok.at) (Ludwig-muzeo); [www.leopoldmuseum.at](http://www.leopoldmuseum.at) (Leopold-muzeo). Walter KLAG

## Netoleremaj patriotoj

Laŭ enketado de loĝantoj de 25 landoj de Eŭropo, pli ol 95 % de la litovoj opinias, ke unue litovoj kaj nur poste enmigrintoj devus esti dungitaj: jen la plej alta procentaĵo en Eŭropo. Plue, litovoj pli abunde ol aliaj eŭropanoj trovas impostojn netolereblaj (plej pagemaj montris sin danoj). Kaj plej altan malestimon al la politika sistemo en sia lando montris litovoj: 30 % taksis ĝin malbona. Tamen inter eŭropanoj litovoj estas patriotoj unuarangaj. Sian landon defendus 46 % de litovoj, kompare kun ekz. en Germanio nur 36 %.

LAST

## BENINO

# Konduku min policejen

**A**penaŭ kredeblas, sed en Benino rompŝtelistoj volas esti arestitaj de la polico. Tio estas, ili preferas polican traktadon ol tiun de ordinaraj civitanoj. Ekzemple en 1999 mortis 30 ŝtelistoj, kiam ilin kaptis popolamaso. Iufoje ŝtelistoj estas benzinumitaj kaj vive bruligataj; eĉ policanoj estas batataj, kiam ili provas savi viktimojn.

Kiel multaj landoj, Benino sperdas ekonomian krizon. Tio kondukas al krimado, aparte al rompŝtelado de ekzemple motorcikloj kaj veturiloj. Ankaŭ bankoj estas pirataj. Ofte krimuloj, se kaptitaj, iras prizonen sed baldaŭ estas liberigitaj kaj rekomencas sian kriman vivon. Leĝoj de frua kolonia periodo ankoraŭ validas kaj pro tio estas sankciataj pluraj deliktoj.


Lastatempe landaj organizaĵoj pri homaj rajtoj kaj la registaro okazigis kampanjon por atentigi pri la neceso fidi la landan justicon: samtempe la registaro promesis ĝin fortigi. Kvankam popola venĝado ne tute malaperis, ĝi tamen malkreskas: falis en la jaro 2000 la nombro de mortigitaj ŝtelistoj. Tamen kaptita ŝtelisto daŭre petas, ke oni konduku lin al la plej proksima policejo.

Christian FABOSSOU

*Malantaŭ impona 18-jarcenta fasado troviĝas unu el la plej grandaj muzeo-kompleksoj de la mondo.*



WALTER KLAG



WALTER KLAG

*Enhavas la muzea kvartalo plurajn vizitindaĵojn: maldekstre la Arthalo, dekstre la Ludwig-muzeo.*

## RUSIO

# Tragika morto de golulo

**S**okego en sporto – pro traŭmato de la kapo, ricevita dum piedpilka matĉo, mortis kapabla 23-jara golulo Sergej Perŝun. Lastsezono li ludis en moskva teamo CSKA, kaj samtempe defendis la golejon de ukraina nacia teamo. Atakata de la kontraŭa teamo, Perŝun eliris el t.n. „punzono”, kaj, strebante kapti la pilkon, kunpuŝiĝis kun membro de la kontraŭa teamo. Perŝun falis kaj lia kapo fortege frapis la grundon: preskaŭ tuj komatiĝinta, li mortis 10 tagojn poste. La aliteamano ricevis cerboskuegon.

## Dua golulo

La unuan fojon en rusia historio mortis golulo pro senpera traŭmato dum matĉo. Malagrabla, sed menciendas, ke precize antaŭ 10 jaroj, somere 1991, CSKA same perdis sian golulon (Miĥail Jerjomin), kiu same aĝis 23 jarojn. Ĉi-jare la tasko de CSKA, kiu pretendas je iuj medaloj, treege komplikiĝis.

Grigorij AROSEV

**Sergej Perŝun:**  
tragike forpasis.



La ĉinoj ĝojas pro novaĵo, ke ili gastigos la olimpiajn ludojn en la jaro 2008.

## OLIMPIKOJ

# Amikecaj ludoj

**P**ro granda emocio ne povis dormi multaj ĉinoj, kiam estis anoncite, ke Ĉinio gastigos la olimpiajn ludojn en la jaro 2008. En diversaj lokoj tra Ĉinio la popolo salutis la novaĵon, dancante kaj kantante. La ĉina prezidanto Jiang Zeming gratulis ĉinojn, dirante: „Elkoran dankon kaj al la ĉina popolo kaj al diversaj amikoj pro ilia granda subteno.”

Kvankam Ĉinio en la lastaj 20 jaroj multe progresis, la sukceso gastigi la olimpikojn kredeble rapidigos konstruadon de moderna ŝtato: vivas multaj ĉinoj en ankoraŭ evoluanta lando. Oni esperas, ke la olimpikoj profundigos amikecon inter ĉinoj kaj ne-ĉinoj kaj ebligos al eksterlandanoj pli bone kompreni Ĉinion.

XU Jinming/pg




## UKRAINIO

# Pape – sed ne tute pace

Kverelis eklezioj pro vizito de papo Johano Paŭlo la 2a al Ukrainio. Membroj de la rusa ortodoksa eklezio okazigis kontraŭpapajn diservojn, dirante, ke la moskva patriarko Aleksij ne sankciis la viziton. Romkatolikoj aliflanke atentigis, ke la papo, invitive de la ukraina prezidanto Leonid Kuĉma, vizitis ne apostole sed ŝtate kiel reprezentanto de Vatikano.

Malgraŭ tio ariĝis ekzemple en urbo Lviv pli ol 1,5 milionoj da kredantoj el Ukrainio, Rusio, Rumanio, Hungario, Slovakio, Italio kaj eĉ el Norda kaj Suda Ameriko. Jen la unua fojo, ke papo vizitis Ukrainion, kie pro internacia prestiĝo oni taksis la viziton signifa.

ARANEOP/G



ARANEOP

FINNLANDO

# Je kio ni kredas?

Preskaŭ ĉiu finnlandano aŭtomate estas baptita luterana protestanto. El la pli ol kvinmiliono loĝantaro ĉ. 4,4 milionoj membras en la ŝtata luterana eklezio, sed nur 10 % partoprenas dimanĉan diservon unufoje monate, dum en centra Eŭropo la frakcio estas 20-30 kaj en suda Eŭropo 40 el 100. En Pollando kaj Irlando la frakcio povas estis 90 %. En Usono 40 % el la loĝantaro frekventas la meson ĉiusemajne.

**O**ni diras, ke la nordiaj landoj estas la plej nereligiaj en la mondo; aliflanke oni diras, ke ĝuste Finnlando estas la plej ekumena lando. Ĉu ĝi estas ankaŭ hipokrita? Malgraŭ la relativa malmulteco de la praktikantaj religiemuloj, la gazetaro dum la kandidateco de la nuna prezidento Tarja Halonen ofte atentigis pri ŝia ne-aneco en la ŝtata eklezio – aŭ iu alia eklezio – kaj pri ŝiaj familiaj rilatoj, ŝia kunvivado kun viro sen laŭleĝa aŭ religia geedziĝo.

## Malsamaj tendencoj

Eŭropo unuiĝas, sed la kredoj kaj

religioj malcentraliĝas kaj dispeciĝas. Senradikaj homoj ne scias, je kio kredi. Se iu homo kun konvinka karismo deklaras, ke Dio ordonis, ke li/ŝi fondu novan religian grupon, li/ŝi baldaŭ trovos samideanojn kaj apogantojn. Homaj rilatoj ege gravas ankaŭ en la religia direktado, kaj ekstremismaj individuoj preferas krei novajn grupojn por si kaj ne subiĝi al la antaŭaj.

Religio ne plu estas socia forto sed privataĵo. Homo povas resti ekster ĉiuj grupoj kaj tamen esti religiema en sia propra maniero. La plej granda ŝanĝiĝo okazinta en la religia vivo de la 20a jarcento estas la plinombriĝo de personoj, kiuj membras en neniuj eklezio aŭ

'Religio ne plu estas socia forto sed privataĵo'



La ortodoksa preĝejo el Helsinko.



La finna „tsasouna”, ligna kultejo.

religia grupo. Eble ĝuste tial muziko ludas pli kaj pli gravan rolon en diservoj. Muziko trudas neniun doktrinon sed lasas spacon por piaj sentoj kaj etoso, mensaj ripozo kaj puriĝo.

### Pluraj konfesioj

La ortodoksa eklezio havas ŝtatan aprobon kaj apogon en Finnlando. Ĝi havas ĉ. 52 000 membrojn kaj unu monaĥejon kaj unu monaĥinejon, kiuj translokiĝis pli okcidenten, kiam iliaj antaŭaj ejoj fariĝis sovetunia propraĵo post la dua mondmilito. Al kelkaj luteranoj ekplaĉas ortodoksismo, kaj ili konvertiĝas. La ortodoksaj muziko kaj arto kortuŝas ilin. La ĉefaj ortodoksaj preĝejoj situas en Helsinko kaj Tampere, sed multaj paroĥoj havas nur modestan lignan kultejon (ruse „casovnja”, finne „tsasouna”), aŭ la paroĥanoj devas vojaĝi longajn distancojn por partopreni la diservon. La Centro de Ortodoksa Arto situas en la urbo Kuopio. Ortodoksaj centroj allogas ankaŭ turistojn kaj kursanojn, ekzemple per ikonpentrado.

La romkatolika eklezio en Finnlando estas ne bone konata; ĝi havas nur ses milojn da anoj, el kiuj multaj enmigris la landon kiel rifuĝintoj, diplomatoj, gastlaboristoj, ktp. Ofte katolikoj devas havi siajn mesojn en hejmoj aŭ en preĝejo komuna al luteranoj, ortodoksuloj kaj katolikoj. Ĉio tio pretigas la vojon al ekumenismo.

Katolikoj estis la unuaj misiistoj en Finnlando, kvankam unu el ili, la angla episkopo Henriko, estis murdita de kontraŭstarema finna bienulo en la 12a jarcento. (Poste Henriko fariĝis la sankta patrono de la lando.) La reĝoj de la ŝtato Svedio-Finnlando malpermesis katolikismon en la 1520aj jaroj kaj konfiskis katolikajn posedaĵojn, nuligis la gemonaĥejojn kaj ŝanĝis la preĝejojn laŭ protestanta stilo. Kiam Finnlando preskaŭ ducent jarojn poste estis aneksita al Rusio, la polaj soldatoj de la caro kaj aliaj ne-finnoj rajtis katoliki ankaŭ en Finnlando, sed ne la indiĝenaj finlandanoj. La leĝo pri religi-libereco estis farita nur en 1929. Antaŭjuĝoj nutritaj dum centoj da jaroj tamen plurestas. Multaj opinias, ke iliaj proksimuloj kredu same kiel ili, aŭ ili preferas tute ne pritrakti religiajn temojn.

Pli konataj ol katolikismo estas en Finnlando pentekostismo (ĉ. 40 000

anoj), atestantoj de Jehovo (ĉ. 20 000 anoj) kaj aliaj kristanaj eklezioj kaj grupoj, kiaj la adventistoj, baptistoj, metodistoj kaj Savarmeo. La judaj paroĥoj havas pli ol mil anojn kaj la islamaj pli ol 10 000, sed ordinara finno kvazaŭ ignoras tion.

### Tipe nordia eklezia grupo

Tipe nordia kristana grupo estas la lestadianoj, kies fondinto, pastoro Lars L. Laestadius (1800-1861) religie vekis la sameojn kaj laponojn kaj faris multon por sobriĝi kaj eduki siajn paroĥanojn. La movado disvastiĝis ankaŭ pli suden kaj eĉ en Usonon kun la elmigrintoj. La lestadianoj ne akceptas la naskoreguladon, rok-muzikon, dancadon, teatron, televidon aŭ pastorinojn. Ĉiosomere ili kunvenas 70 000- ĝis 80 000-ope dum unu semajno, kiam la dise loĝantaj gejunuloj povas renkontiĝi. Ili havas tri edukajn institutojn por adoleskantoj, sed grandparte ili restas



Lars L. Laestadius fondis tipe nordian kristanan grupon, la lestadianojn.

membroj de la ŝtata luterana eklezio, kvankam okazas konfliktoj, ekz. pro ina pastoro.

### ... kaj la cetero ...

Povus esti listigataj pli ol 150 aliaj religiaj grupetoj, kies ideoj envenis la landon aŭ de Usono aŭ de Azio, ĉefe de Barato, kaj kiuj estas pli-malpli konataj tutmonde: scientologio, Kriŝna-movado, bahaismo, framasonismo, budismo, teozofio, antropozofio ktp. Ne ĉiam facilas difini, kio estas religio, kio mensa terapio, kio orienta batalarto aŭ jogo. Kelkaj grupnomoj klopodas kortuŝi homojn: Amikoj de Vero, Pado de Lumo, Amikoj de Silento, Popolo de Dio ... Ĉiu kredas, aŭ almenaŭ deklaras, ke ĝuste ili estas pravaj, verdiraj. Troveblas grupetoj, kiuj intence dediĉas sin al Satano kaj volas hontigi la tradiciajn sanktaĵojn kaj virtojn. Tio jam timigas la publikon, ĉar okazas detruado de tombejoj, vandalismo, priŝtelado kaj incendioj en preĝejoj. Kelkaj grupanoj uzas drogojn kaj konsideras sin liberaj de la leĝoj kaj komuna bonkonduo. Antaŭ nelonge estis kondamnita grupo da gejunuloj, kiuj murdis kaj dispecigis sian kamaradon laŭrite. La ĉefkondamnito, arogante ridetanta sur la televida ekrano, surprizis kaj konfuzis la spektantojn. Instruistoj kaj gepatroj estas avertitaj, ke ili prizorgu siajn adoleskajn gefilojn kaj decideme interveni antaŭ ol estos tro malfrue. Kelkaj lernejoj malpermesis vestaĵojn, sur kiuj videblas emblemoj de dubinde danĝeraj rok-ensembloj, sed kelkaj homoj, precipe gejunuloj, arde ribelas kontraŭ la limigoj.

Jes ja, je kio ni kredu? Ŝajnas, ke la homo nepre bezonas ideologion aŭ kredon, kaj ŝajnas ankaŭ, ke iuj ŝatas esti kaj la aliaj subiĝi. Saliko

La artikolo parte baziĝas sur libro de Harri Heino, estro de eklezia esplorcentro, doktoro pri teologio.

## Ŝanĝiĝanta aspekto de kristanismo

Depost la mezo de l' 20a jarcento, ĉiam pli eksplode kreskas novastilaj kristanaj eklezioj, kiujn karakterizas ne tiom la tradiciaj pri- aŭ kontraŭ-dogmaj aŭ priliturgiaj harfendaĵoj de la pasinteco, kiom elkora travivo de la fido, gajeca liturgio, kantado plenpulma kaj ĝoja, konfido je la ĉionpardonema dio. Ĉefas inter ili evangelikaloj kaj pentekostanoj. Antaŭ nelonge mi trovis kelkajn nombrojn kiuj – kvankam ne tute ekzakte pruveblaj – bone ilustras tiun kreskon de la pli novaj kristanaj movadoj. Kristanismo en la mondo laŭ tiuj nombroj nuntempe kalkulus pli ol du miliardojn da homoj: 1 056 920 000 romkatolikoj; 215 129 000 ortodoksuloj (grekaj, rusaj k.a.); 342 035 000 tradiciaj protestantoj (luteranoj, kalvinanoj k.a.); 79 650 000 anglikanoj; 6 688 000 prakatolikoj; 647 810 000 evangelikaloj; 523 767 000 pentekostanoj.

Gerrit BERVELING

# Malaperanta lingva heredaĵo

Unu el la pli ĝojigaj aspektoj de la disvolviĝantaj rilatoj inter la landoj de Eŭropo estas revekiĝanta konscio pri la kultura kaj lingva riĉeco de la popoloj de tiu kontinento. Samtempe, tamen, oni konstatas la malĝojan fakton, ke granda parto de tiu trezoro estas severe endanĝeriĝinta, precipe kiam temas pri lingvoj, kiuj nun estas minoritataj, kvankam kelkaj iam estis idiomoj de plimulto.

**D**um diversaj kongresoj de esperantistoj, tiuj havis okazon partopreni enkondukajn kursetojn pri tiaj minoritataj lingvoj.

Por entuziasmoj pri la lingvoj de la homaro, regionaj idiomoj kaj dialektoj ofte estas pli interesaj, pro tio, ke ili estas malpli konataj ol la nacilingvoj instruataj en la lernejoj aŭ aŭdataj en kinejoj kaj radisendaĵoj, do pli freŝaj kaj unikaj. Tiel, en Prago, en la jaro 1996, mi ĉeestis prelegon de John Wells pri la kimra lingvo; en 1998, en Montpeliero, mi partoprenis kurseton pri la bela langvedoka, kaj ankaŭ aŭskultis prelegon pri la berbera lingvo de norda Afriko. Dum berlina kongreso, en 1999, mi ĉeestis kurseton pri la soraba, slava lingvo parolata de malplimulto en orienta Germanio.




## Ŝetlanda insulo

En la sesdekaj jaroj, mi loĝis dumtempe kun mia familio, sur eta insulo nomata Fair Isle (*Frisle* [frajl] en la insula dialekto), kiu estas parto de la ŝetlanda insularo. Tiam, ĉiu ŝetlandano, ĉu juna, ĉu maljuna, parolis la ŝetlandan. Mi rememoras, ke iam mi devis viziti la oficejon de la ŝetlanda regiona fako pri edukado, kaj dum atendo mi aŭskultis la vicĉefon de la instanco parolantan telefone. Kvankam je mia eniro, li alparolis min en normala angla, ĉe la telefono li uzis la ŝetlandan. Al angla lingvanoj, ĝi sonas

iom maledukita aŭ infaneca ĉar, ekzemple, oni uzas singularan formon de la verbo *esti* kun plurala substantivo aŭ pronomo. Parolante la anglan, edukita plenkreskulo ne faras tion, kio estas rigardata kiel gramatika eraro.

La normigita angla aplikas laŭ la diversaj personaj pronomoj, malsamajn finaĵojn al la verbo, tiele: *I am, (thou art), he is, you are*, ktp. (Komparu la esperantan verbon: „mi estas, vi estas, li estas ...” kaj la modernan norvegan: *jeg er, du er, han er* ...) Plie, la ŝetlandanoj ne uzas la „lispan” sonon *th*, kvankam ĝi ekzistis en la antikva ŝetlanda, kiel ankoraŭ en la moderna islanda. Do, ekzem-

ple, anstataŭ la angla: *Are you in the church?* („Ĉu vi estas en la preĝejo?”), ili diras, *Is du in da kirk?* Plie, la ŝetlanda prononcmansiero estas tute ne angla, sed skandinava, do apenaŭ, aŭ tute ne, komprenata de angloj. Aliflanke, post iom da tempo, skotoj alkutimiĝas al la ŝetlanda, ĉar la plimulto de la aktuala vortaro estas komuna al malaltejaj skotaj dialektoj, kaj ne malmulte da vortoj (kvankam ne la samaj kiel en la skota) estas uzataj en la



gaela (kelta) lingvo. La lastaj estas precipe maraj kaj ŝipaj terminoj, dum la skotdevenaj estas pli teraj kaj hejmaj. Faŭna terminaro inkludas diversajn skandinavajn vortojn nekonatajn en la angla lingvo aŭ en la skotaj dialektoj.

En la pasinta jarcento, feroa fakulo, Jakob Jakobsen trovis pli ol 10 000 skandinavajn vortojn ekzistantajn ankoraŭ en la ŝetlanda. Malmultaj el tiu listo nun estas uzataj aŭ komprenataj de ŝetlandanoj. Tamen, la insulanoj rigardas sian idiomon kiel skandinavon, ne skotan lingvon. Ĉu oni nomu ĝin „lingvo” aŭ „dialekto” estas subjektiva kaj seninteresa afero.

La fonetika gamo de la ŝetlanda estas sufiĉe vasta. Ĝi enhavas almenaŭ 12 malsamajn vokalajn sonojn, kompare kun la ĉeflandaj skotaj dialektoj, el kiuj kelkaj havas nur 9. Tiuj sonoj estas tute malsimilaj al la anglaj.

### Specimeno: Poemo de Jamieson

Sube, troviĝas specimeno de la aktuala ŝetlanda: poemo de insulana verkisto Robert Alan Jamieson [ĝejmison]. (Malkiel la plimulto da poetoj de la 20a jarcento, kiuj imitas anglan aŭ skotan skribmanieron, Jamieson literumas kelkajn vortojn laŭ skandinava sistemo: li uzas, ekzemple, la ligaturon æ. Tia skandinava literumado estas tendenco inter modernaj ŝetlandaj aŭtoroj, sed ili ne interkonsentas pri uzendaj skandinavaj literoj. Iuj preferas norvegajn/danajn literojn, ekzemple strekita o (ø), dum aliaj uzas svedan/islandan ö. Jen la menciitaj versaĵoj de Jamieson, kun traduko en Esperanton:

#### At Da Eela (Ĉe la Fiŝkaptejo)

*Æ fyn nyght Lyn fyshin Wie sum oda aald men, Lissnin t'stoaries As sjærp as da sie ær A hjoock slips his grip, Kuts trow wiet skjyn, Tærs his toom opin An he fiels da saat byt. Haalt fae da depts, piltiks'*

*sprikkil, glissin, Glæpin fir waatir, Gills flaapin, die. Bld fæ da hjoock merk Drips ida oshin - Glæmin broon sie lævs o tang Swiem firmest da grien spaars in a kaald wiet wirtl As da lyns wind oot.*

Esperante: lun belan nokton fiŝante fadene kun iuj el la maljunuloj aŭskultante rakontojn tiel akrajn kiel la maraero fiŝhoko glitas el lia pojno tranĉas malsekan haŭton ŝiras lian dikfingron kaj li sentas la salan mordon trenitaj el la profundaĵoj merlangoj<sup>2</sup> glime fajreras spasme baraktas, serĉante akvon branke batante, mortas. Sango el la fiŝhoka vundo gutas en la oceanon – Brile brunaj fukaj marfolioj naĝas preter la tabuloj en malvarma malseka mondo Dum la fiŝfadenoj elvolviĝas.

Malgraŭ la kvazaŭa skandinavigo de la skribmaniero, la vortaro de tiu poemo estas pli skota ol skandinava. Kvankam la ŝetlandanoj tradicie rifuzas rekoni, ke ilia insularo estas parto de Skotlando, kaj rigardas sin kiel skandinavdevenaj britoj, la ŝetlanda ne plu enhavas multe da la originala nordana vortaro. Tamen, tio estas relative moderna ŝanĝiĝo.

Ĝis almenaŭ la 19a jarcento, la ŝetlanda nomiĝis *Norn* kaj estis tute skandinava lingvo. Iom post iom, skotaj kaj skotanglaj vortoj anstataŭis la skandinavajn, kaj tiu transformiĝo hodiaŭ daŭras.

#### Folkloro versaĵo

Troviĝas en la ŝetlanda folkloro, mallonga versaĵo (eble 19-jarcenta) en kiu iu patrino el insulo Unst (norda Ŝetlando) fieras pri tio, ke ŝia filo lernas la skotan aŭ skotanglan, tiam rigardatan kiel „korrekta” lingvaĵo. En sia noma lingvo, ŝi faronas:

*De var a gue ti (= Ĝi estis bona tempo) when son min guid to Kadanæs: (= kiam mia filo iris al Caithness<sup>3</sup> han kan caa rossa „mare” (= li povas nomi ĉevalinon „mare”) han kan caa bygg(e) „bere” (= li povas nomi hordeon „bere”) han kan caa eld „fire” (= li povas nomi*

fajron „fire”) *han kan caa klovandi „taings” (= li povas nomi karboprenilon „taings”).*

Oni konstatas, tamen, ke en ĉi tiu fragmento, la *Norn* de la patrino jam estis en tiu epoko, forte influita de la skotangla. Ŝi uzas a anstataŭ skandinavon *en*; *gue* anstataŭ *god*; *to* anstataŭ *til*; *when* anstataŭ *hven*; *guid* anstataŭ *gikk*; kaj *caa* anstataŭ *kalla*. Fakte, a, *when* kaj *to* estas ne skotaj sed anglaj vortoj. La skotaj ekvivalentoj estas, respektive, *ane* [ejn]

*whan* (aŭ *fan*), kaj *til*, kiuj estas pli proksimaj al la skandinavaj vortoj.

#### Sorto de nordaj lingvoj

Simile, gepatroj en Ŝetlando nun spertas, ke iliaj gefiloj pli ofte parolas anglan. Geavoj plendas, ke la genepoj ne bone komprenas ilin kiam ili parolas ŝetlande. Ĉiam, kiam mi estis en Lerwick, la ĉefurbo de Ŝetlando, la ŝetlanda estis la ĉiutaga lingvo de ĉiuj, kvankam ili kapablis pli bone paroli la normigitan anglan ol multe da angloj. (Kompreneble, ili parolis la anglan kun tuj rekonebla ŝetlanda prononco, sed kapablis klare prononci la neŝetlandan sonon *th*, kiu ja ekzistis en la antikva *Norn*, sed ne en la moderna ŝetlanda. En la islanda lingvo, kiu apenaŭ ŝanĝiĝis ekde la tempo de la eddoj kaj sagaoj, tiu sono estas reprezentata per *ð*. La sono de la ŝetlanda estas mole agraba. Ĝi havas nek la tonsistemon nek la kantan intonacion de la modernaj norvega kaj sveda lingvoj.

*Norn* jam efektive mortis, kvankam restaĵoj restas en la ŝetlanda. Mi demandas min, ĉu tio estos la sorto ankaŭ de la aliaj skandinavaj lingvoj. Maljuna islanda esperantisto iufoje diris al mi, ke verŝajne liaj samlandanoj parolos en estonteco ne la islandan sed la anglan.

La glora bengala verkisto Rabindranath Tagore deziris, ke ĉiu nacio portu siajn spiritajn varojn en la merkaton de la mondo por riĉigi ĝin. Tiu spiritaj varoj inkludas niajn lingvajn trezorojn. Mi timas, ke ni perdos ilin ...

Garbhan MACAOIDH

1. Artikoloj pri la ŝetlanda kaj poemoj en literatura revuo *Lallans*, n-ro 58, Ware (Printempo) 2001. Scots Leid Associe (Skota Lingva Asocio), A.K. Bell Library, York Place, Perth PH2 8AP, Skotlando. Tiu revuo enhavas liston de verkoj en angla lingvo pri la ŝetlanda kaj la norna.

2. Ŝetlanda nomo de juna fiŝo de specio „nigra merlango” (fakte, pli verdkolora ol nigra).

3. Caithness [kejtnes]: plej norda graflando sur la skota ĉeftero.

FINNLANDO-FRANCIO

# Lignaj naturartaĵoj

Homo ofte estas kvazaŭ sorĉita de la naturo. Dum li migras en maljunaj arbaregoj, lignopecoj kaj stumpoj „alparolas” lin.

**E**n ili eblas „ekvidi” mitajn estaĵojn, fablajn bestojn, bibliajn scenojn. Kiam li sidiĝas sur arbostumpon, li povas kvazaŭ aŭdi la frustradon de gnomoj aŭ troloj, birdoj kaj feoj altiras lian atenton. En muskokovrita ligna ŝvelaĵo aŭ tubero eblas distingi la konturojn de statueto.

## Inspirantaj lignaĵoj en Finnlando


La finno Oke Utter nomas sin servisto de la naturo. Li loĝas en la arbaroriĉa, duonsovaĝa municipo Lestijärvi. De dudeko da jaroj li hejmenportas lignopecojn diversgrandajn, kiuj inspiris lin. Sur ĉiun el ili li metas etikedon kun teksto pri la pensoj, kiuj venis en lian kapon dum la tago de ĝia trovo, silente kontemplant la vivon en la arbaro.

Povas okazi, ke la vivestaĵo aŭ bildo, enestanta en la muta ligno, „aperos” post monato aŭ eĉ post multaj jaroj.

Tri kvaronoj de la kolektata lignomaterialo de Utter devenas de maljunegaj pinoj. Kvarono – de tremoloj kuŝintaj en marĉoj, de betuloj kaj aliaj skandinaviaj arbo-specioj. Lin inspiris ankaŭ lignaĵoj, flosintaj en Arkta Maro kaj truitaj de konkolarvoj. Tranĉinte lignopecon per segilo, eblas vidi ene pejzaĝon (ĉielo kaj nuboj, lago kun insuloj, marĉo kun arbarrando) aŭ iun alian surprizon. En lia hejmo konstante videblas ekspozicio de artaĵoj, estiĝintaj rezulte de naturkapricoj. La korton de Utter karakterizas arĝentgrizaj arbotrunkoj sekaj, sur kies branĉoj es-

tas birdegoj kaj feoj. Ofte preterpasantoj haltas surstrate kaj estas invitataj eniri la korton kaj admirii liajn plej novajn prilaboritajn artaĵojn.

Somere Oke Utter kolektas naturartaĵojn, kreitajn de formikoj, larvoj, pegoj, sekve de putro, fulmo, ŝtormo, fajro, akvo, progresinta aĝo. Ofte sufiĉas, ke li nur forigu la rubojn, muskojn kaj tro molajn partojn, kaj la trovaĵo ricevas nomon de scenoj el la Biblio, el la finna nacia epopeo Kalevala aŭ el iu konata mito aŭ fablo. En la kavetojn de la purigita ligna naturartaĵo li povas enmeti unu aŭ plurajn lampetojn, por ke li pli bone vidu la strukturon kaj surfacon. Li farbas la artaĵojn, uzante naturajn kolorigilojn, kiujn li mem fabrikas,



Oke Utter: servisto de la naturo.






La Muzeo de Mil kaj unu Radikoj en Cornimont, Francio.



Michel Maurice en Vogeza Arbaro.



La kamelo kaj bedueno de M. Maurice.

muelante buntajn lignopecojn en maljuna kafmuelilo. Ĉiuj liaj trovaĵoj odoras je arbaro kaj plibeligas post lavado.

### Skandinavia ekspozicio

Oke Utter kune kun kvindek da artamatoroj kaj skulptistoj okazigas ĉi-somere grandegan subtegmentan ekspozicion sur 1000 m<sup>2</sup> en Juva, orienta Finnlando. Ĝi estas la plej granda skandinavia ekspozicio pri lignaj naturartaĵoj, kiun ĉiujare vizitas 50 000 personoj. Nun Utter kaj liaj kolegoj planas meditejon, konstruotan el kruda lig-

no kaj ornamotan per la plej belaj naturartaĵoj arbaraj. Danke al la naturdonacoj, Oke povis entute dediĉi sin al sia hobbio kaj ne plu bredi vulpojn akiri peltaĵojn – laboro, kiu komencis naŭzi lin.

Kelkfoje oni invitis lin aranĝi ekspozicion eksterlande (ekzemple, en Hispanio aŭ Svislando).

### Muzeo en Francio

Tamen ne nur skandinavo estas sorĉitaj de la arbaro. En la franca urbo Cornimont Michel Maurice [mišel moris] konstruis *Muzeon de mil kaj unu radikoj* kaj lasas la vizitantojn senpage admiri lignajn naturartaĵojn, kiujn li trovis en la vogeza arbaregoj kaj ties torentoj. Sur la planko de la muzeo preskaŭ libere kreskas hedero, inter kiu lirlas rojeto kun karpoj.

Sur la muroj kaj bretaroj, sub la plafono kaj en la vitraj ŝrankoj estas centoj da belegaj eksponaĵoj: ligno tute truita de

visko; piceotrunko, kavigita de formikoj; tindroj, aspektantaj kiel birdoj aŭ feinoj; lignopecoj, similantaj al bestoj aŭ anĝeloj – ĉio ĉi estas fruktoj de vivlonga serĉado, kiu vigliĝis post la pensiigo de Maurice.

La kolektantojn de naturartaĵoj ties proksimuloj povas nomi artistoj aŭ frenezuloj. Tamen ili mem enprofundiĝas en sian hobion, forskuante ĉiujn kromnomojn. Tiuj kolektantoj konas milojn da faktoj kaj legendoj pri arbaroj. La eroj de iliaj kolektaĵoj „ekvivas”, se oni dediĉas tempon „aŭskulti” iliajn verajn rakontojn.

Saliko

# Ne forgesu min...



- diverslandaj festotagoj
- lun-fazoj
- aliaj informoj



Donacu ĝin al viaj amikoj!  
Rabato de 33% por sendaĵo de 3 ekzempleroj aŭ pli.



## LA JARO

praktika Esperanto-agendo

formato 10x15cm; prezo: vidu p.2  
mendu ĉe FEL, Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen

butiko@fel.esperanto.be

+ 32 3 233 54 33

## GERMANIO

# Katedralaj trezoroj en nova aranĝo

La katedralo de Speyer [ŝpaja] (Palatinato, sud-okcidenta Germanio), fondita ĉirkaŭ la jaro 1025, spertis dum sia preskaŭ miljara historio plurajn detruojn.

**P**lej katastrofe al ĝi efikis la forbruligo de la urbo fare de francaj trupoj en 1689 kaj la franca militokupado de la regiono ekde 1792. Nur pene oni sukcesis malhelpi la definitivon neniigon de la katedrala konstruaĵo. Nuntempe, rekonstruita laŭ la romanika projekto origina, ĝi apartenas al la protektata „Heredaĵo de homaro”. Malmultaj el la katedralaj trezoroj estis konservitaj ĝis nun. Tamen la preĝejo kaŝe konservis trezorojn nemateriajn, kiuj estas multe pli valoraj ol kalikoj kaj sanktuoj el arĝento aŭ oro. Estis ja sciate, ke en la katedralo situis la tomboj de la imperiestra familio Salier, reginta mezepoke dum jarcento la Sanktan Romian-Germanan Imperion. Tion eksciis ankaŭ francaj soldatoj kaj prirabis kelkajn sarkofagojn, tamen feliĉe nur malmultajn.

La unuajn sciencajn foslaborojn sur la tereno katedrala oni faris en la jaro 1900. Tiam estis trovitaj multaj tomboj kaj oni povis ekscii interalie pere de skribaj dokumentoj sur metalaj platoj, pri kiuj reĝo, imperiestro aŭ ties familiano temas. Krom la fingroringo de Henriko la 4a kaj la „Imperia pomo” de Henriko la 3a plej gravaj estas la tombaj kronoj de imperiestroj kaj imperiestrinoj, kiuj dokumentas la pretendon je monda kaj eklezia potenco eĉ post la morto. Kopio de la krono de Konrado la 2a nuntempe ornamas – multoble pligrandigita – la centron de la katedralo.

La tiam elfositaj tombotrezoroj – materiaj samkiel ideaj – trovis lokon en la tiel nomata *Domschatzkammer* [domŝackama] (ĉambro de la katedralaj trezoroj), kiu tamen troviĝas ne en la katedralo mem, sed en la tre proksima Historia Muzeo de Palatinato.

Tie oni faris ĉi-jare novaranĝon de la restaĵoj kaj okazis solena malfermo en la katedralo mem. Okaze de tio parolis la episkopo de Speyer, reprezentantoj de la fondaĵo de Historia Muzeo de Palatinato kaj ties direktorino.


Poste la ĉeestantaro transiris al la muzeo por admirari la novan ekspozician koncepton. Nun ĉio prezentiĝas je ruĝkolora fono, akompanate de klarigaj tekstoj. La kreintoj de nova aranĝo fieras pri dudekminuta *Multivisionsshow* (plumedia spektaklo), komputilaj ekranoj kaj *Touchscreens* (fingrotuŝe funkciigeblaj komputilprogramoj).

Memkompreneble la ekspozicio ampleksas ne nur la tombotrezorojn. Videblas ankaŭ multaj objektoj, kiuj estis uzataj en ekleziaj ritoj: ujoj, vestaĵoj, bildoj, skulptaĵoj ktp. Aldone al tio estas dokumentoj pri la (re)konstruado de la ka-

tedralo kaj bildoj pri ties stato divers-tempe, iuj el kiuj estas ankaŭ en formo de modelo. La plej grandaj inter la ekspoziciaĵoj estas freskoj, translokitaj el la katedralo mem.

En la epoko de romantikismo munkena pentristo Schraudolph [ŝraudolf] – laŭ ordono de bavara reĝo Ludoviko la 1a – omamis la katedralon per monumentecaj historiaj freskoj. Kiam en la dua duono de la 20a jarcento konservorilate ekregis pli originemaj konceptoj, oni forprenis multajn aldonaĵojn el la epoko de romantikismo. Feliĉe oni povis savi ilin, kaj elekto el la tuto nun impresas de proksime la vizitantojn, kio antaŭe videblis nur je distanco.

La furoraĵo (krom la tombo-ekspoziciaĵoj) estas ne io grandioza, sed nur malgranda tekstopaĝo, kiun oni trovis antaŭ malmultaj jaroj subplanke




La katedralo de Speyer.



La malfermo de la imperiestraj tomboj en 1900.

de la Afra-kapelo de la katedralo. Temas pri la lasta paĝo de la tiel nomata „Ulphilas-biblio”, la *Codex Argenteus* en la gota lingvo, kiu fragmente nuntempe estas konservata en la sveda urbo Uppsala. Neniu scias, kiel ĝi trafis Speyer, eĉ kun adreso al Philipp Melanchthon [filip melanhthon], la plej grava germana reformisto eklezia post Luther. Sed tiun ĉi unikaĵon oni povis admiri nur dum la tagoj de oficiala malfemo, ĉar daŭra tag-lumo damaĝus ĝin.

Ankaŭ sen tiu eksterordinara allogaĵo estas ege multaj ekspoziciaĵoj – admirindaj, studindaj, vizitindaj – en la Historia Muzeo de Palatinato. La muzeo aldone prezentas ekspoziciojn pri la regi-



La Historia Muzeo de Palatinato en Speyer.



La krono de Konrado la 2a.

ono, precipe pri ties romia historio kaj kamparana vinproduktado, kaj proponas ankaŭ provizorajn ekspoziciojn pri diversaj allogaj temoj. La muzeo estas malferrita marde – dimanĉe de la 10a ĝis la 18a horo.

Krome la tuta urbo Speyer estas alloga celo turisma. La vizitantoj konstato, ke ne plu validas la iama loka mokproverbo: „Se ne estus la mortintaj imperiestroj, ne estus vivo en la urbo”.

Franz-Georg ROESSLER


# Nova verko en la serio de FEL



Paĝoj: 106; ilustrita;  
21 cm; kudre bindita;

Prezo: **12,00 €**

Jen tri perletoj de la flandra literaturo. *Ceciljan mi vidis veni* estas proza poemo, idilio kun tragika fino, melankolia romano. En *La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforoza*, begineto la juna begineto Simforoza enamiĝas al la ĝardenisto Marteno, kiu poste eniras la monaĥejon. Tre bela, simpla kaj pura historio. *Kristnaska Triptiko* estas vera juvelo pro sia naiva, pia priskribo.



# IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

## Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

## Kiel funkcias?

Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

## Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple reŝendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi ricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

## Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo

Frankrijklei 140

2000 Antwerpen


tlf. +32 3 234 34 00

tlk. +32 3 233 54 33

rete: [butikofel@esperanto.be](mailto:butikofel@esperanto.be)

<http://retbutikofel.esperanto.be>

Stafeto  
librorondo





Sub gvidado de profesoro V. Sirvydis litovaj kirurgoj unuafoje transplantis koron por 15-monata bebo.

## ORGANTRANSPLANTADO

# La litova prezidanto donacis siajn organojn

**L**a litova prezidanto Valdas Adamkus donacis siajn organojn kaj histojn por transplantado post sia morto. Tiel li esperas instigi ankaŭ aliajn personojn doni siajn organojn samcele. La prezidanto faris la decidon post kiam litovaj kirurgoj sukcese transplantis koron de dujara knabo, pereinta en akcidento, al 15-monata knabino, naskita kun malsana koro kaj de tiam jam dufoje operaciita.

Antaŭ tiu evento la plej juna paciento kun transplantita koro en Litovio estis 19-jara junulo. Entute ekde la jaro 1987 en Litovio estis faritaj 24 operacioj de kortransplantado. La plej longe kun transplantita koro viro vivas jam sesan jaron. La plej aĝa paciento, kiu subigis sin al reno-transplantado, estis 68-jara. Kun transplantita reno vivas persono eĉ jam de 25 jaroj.

En Litovio ĉirkaŭ dudek personoj atendas kortransplantadon kaj tiun de renoj preskaŭ kvarcent. La problemo estas organdonantoj. Ĝis nun en Litovio donis siajn organojn kaj histojn al postmorta transplantado al malsanuloj nur 450 personoj kaj ses deklaris sian negativan decidon. Pasintjare inter unu miliono da loĝantoj en Litovio estis averaĝe nur 5,7 organdonacantoj, dum en aliaj eŭropaj landoj 15 ĝis 20 kaj en Hispanio eĉ 33,6.

Ĉi-momente en Litovio oni prakti-

kas transplantadon de koro, koraj valvoj, renoj, mjelo, osthisto, haŭto, angioj. La plej lastaj provoj transplanti hepaton malsukcesis. Post la operacio ĉiuj kvar malsanuloj mortis.

Organdonado en Litovio estas senkosta male ol sangodonado. LAST

## Ĉu fordoni siajn organojn?

Transplantado de organoj fariĝis ordinara, sava rimedo por sennombraj pacientoj; tamen, kiel la revuo *JAMA* raportas, rifuzo fordoni organojn de mortintoj, fare de ties familianoj, ege limigas tiun ebilon. Esploristoj en Usono enketis ĉe familianoj de mortintoj en naŭ traŭmalthospitaloj, pri la kialoj de konsento aŭ rifuzo.

El 420 eblaj fordonokazoj, oni atingis 238 konsentojn. Pluraj faktoroj influis la finan decidon: etno, aĝo de la paciento, kaŭzo de la morto kaj konscio pri la antaŭa deziro de la paciento mem estis ĉefaj faktoroj por konsento. Familioj, kiuj pli detale diskutis pri organfordonado kaj pli multe interparolis pri la afero kun kuracistoj kaj fakuloj plej ofte emis konsenti. Sociaj, emociaj kaj komunikaj cirkonstancoj influis la decidon.

El la esploro oni memkompreneble konkludis, ke tre gravas publika edukado kaj konsciigo pri la graveco de organfordono.

Paulo S. VIANA

## Cerba lezo pro telefonaparato


**T**eni la telefonaparaton premita inter la kapo kaj la ŝultro dum longa interparolo eble kaŭzas lezon.

La usona revuo *Neurology* (kaj ankaŭ *JAMA* en aprilo 2000) sciigis, ke franca 43-jara kuracisto suferis ikton post unuhora parolo kun paciento. Tuj post malŝalto de la aparato, li suferis portempe pro blindiĝo de unu okulo, zumado ĉe unu orelo kaj balbutado.

Angiografio montris rompiĝon de la karotida arterio kaj komputil-tomografio montris, ke la lezon kaŭzis escepte longa krania ostopinto, proksima al la orelo.

Ĉar ne eblas antaŭscii, kiu homo havas tian longan ostovariaĵon, tial estas rekomendate, ke oni evitu tro longatempan tordadon de la kolo.


Paulo S. VIANA



AŬSTRIO

# Pri la antikva arto en Egiptio


*Staranta figuro de Ra-maat, ĉ. 2250 a. K., kalkŝtono.*



En Leoben, dua granda urbo de sudaŭstria lando Stirio, estis organizita ampleksa ekspozicio „Egiptio – en la regno de faraonoj. Serĉante belecon kaj perfektecon”. La ekspozicio estis origine konceptita por prezentado en Japanio en 2002, sed antaŭe – ekskluzive por Eŭropo – estis videbla en Leoben ĝis la 4a de novembro. 200 valoraj originalaj altkvalitaj ekspoziciaĵoj el kvar jarmiloj estas je dispono de ĉiuj vizitantoj en la urba arthalo. La multekostaĵoj estas prenitaj el la muzeoj Roemer, Pelizaeus (Hildesheim, Germanio) kaj de la Arthistoria muzeo en Vieno.



Fragmento de templo-reliefo kun reĝino Arsinoe la 2a, post 270 a. K., kalkŝtono.




Paro de orelringoj kun kapo de taŭro kaj perloj el la 3a jarcento a. K., oro kun verda ŝtono.



Interna parto de sarkofago de Penju, ĉ. 800 a. K.



Reliefo de virinkapo el la 13a jarcento a. K., kalkŝtono.



Pordo de Anĥ, 2180 a. K., kalkŝtono, pentrita.

**E**giptio – la fascina lando de faraonoj, obeliskoj kaj piramidoj – estis ĉiam alloga por vizitantoj, aventuremuloj kaj esplorantoj. Monumentecaj tomboj, plenaj de riĉaĵoj por la transa mondo, temploj, imponaj kaj enigmaj statuoj kiel sfinksoj, hieroglifoj, bildoj de homoj, dioj kaj multo alia altiris homamasojn al Egiptio, por okazigi tie esplorojn kaj elfosojn. Danke al novaj malkovroj, hodiaŭ troviĝas pluraj valoraĵoj en muzeoj.

La temo ne estis hazarda. Nur en Egiptio tian grandan rolon havis la ideala bildo de beleco, esprimita en la ornamo kaj modo. Elegantaj ornamaĵoj, surmure ellaboritaj reliefoj, skulptaĵoj, belege faritaj objektoj por ĉiutaga uzo, idealigitaj statuoj de dioj kaj kolorriĉaj

amuletoj el la epoko de la grandaj faraonoj kiel Keopso, Ramseso la 2a aŭ Tutankamono – ĉio ĉi montris ne nur la pompan surteran mondon, sed ankaŭ la allogan mondon de dioj, kiuj por la homoj el antikva Egiptio havis grandegan signifon dum la tuta vivo.

Sendube, la demonstrita egipta mortokulto posedis grandan altiran forton – ĉiu vizitanto de la ekspozicio sentis la misteran atmosferon de la mumioj. Antikva egipta arto estas tre esprimiva, pro la tre varia uzado de multaj materialoj, kaj samtempe tro konservativa. Kaj la proporcioj de la homa korpo, kaj la formo de junaj vizaĝoj, stilo kaj formo de hararanĝoj, vestoj kaj eĉ gestoj ŝanĝiĝis kun la tempo. La koncepto pri ideala beleco est-

igis la eksterajn de viroj kaj virinoj. Ĉi tiu idealo kaj tiaj portretoj restas belaj eterne kaj neŝanĝeblaj.

La celo de antikva egipta arto estis prezenti homon kiel figuron, kiu posedas samtempan validecon por la surtera kaj transa vivo. Ankaŭ ĉi tiu bildo estis ŝanĝebla, ja stiltendencoj kaj modoj venis kaj foriris en antikva Egiptio, kvankam tio restas nerimarkebla por la supra rigardanto.

La atentokapta ordigo de la ekspozicio gvidas la vizitantojn en la misteran landon ĉe Nilo. Do, la vizito transformiĝas en malkovran veturon kaj en serĉon kaj trovon de la ideala beleco kaj perfekteco en la artaĵoj de antikva Egiptio.

Evgeni GEORGIEV

de Pejno Simono

# Tagmeze en Tunizo

„Kie estas la damninda slipo? Jen sescent dolaroj, jen la flugbiletoj, sed kie estas la slipo? Tiun Kristinan mi murdos, mi ŝin masakros maĉete!” ĉion ĉi pensis al si Davido Ruselo, kalva, dika mezaĝulo, dum li serĉis plu en la ĥaoso de ilia komuna oficejo. „Eble sufiĉos simpla nudmana strangolado.”

La strangolota Kristina estis lia sekretariino. Knabino deknaŭjaraĝa, beleta, ĉarma kaj vere aminda. Tamen iomete forgesema. Nu, Davido laboris kiel direktisto de eksportado koncerne Germanujon kaj Skandinavion. Lia propra ĉefo, Luko, estis alvokinta lin la antaŭan tagon malfrue vespere kun la tute ne atendita komisiono frumatenne flugi Tunizon. Davido okupiĝu pri la instalo kaj demonstracio de iu el iliaj komputiloj por la Tunizia Ministrejo pri Edukado. „Pro nia afero oni planas okazigi grandan kunvenon de ĉiuj ministrestroj, en tiu vi nepre partumu”, estis dirinta Luko. „Ĉiujn detalojn mi estas jam rakontinta al via Kristina, por ke ŝi skribu slipon por vi”, li estis daŭriginta. „Mi mem devas tuj rapidi al la flughaveno por atingi la maŝinon al Bankoko. Ĝis la!”

Nu, Kristina fakte estis studento kaj nur pasigis praktikon ĉe la entrepreno. Kiam Davido mem dungigis ĉe tiu Franca firmao, proksima al Parizo, Luko promesis, „Davido, por vi ni havos sekretariinon trilingvan”. Davido klare memoras, ke tiu tiama eldiro estis tre trankviliginta lin, ĉar lia Franca vere ne estis tiom bona. Alveninte, Davido povis konstati, ke lia Kristina ja vere estis trilingva, simile kiel li mem. La promeso de Luko estis do tute valida. Bedaŭrinde tamen - kaj jen vere iom ĝena tameno - iliaj respektivaj trilingvecoj tute ne kongruis. Ŝi parolis - la Francan, la Hispanan kaj la Italan - li parolis - la Anglan, la Germanan kaj la Rusan. Ilia interkomunikado ĉe la verkado de iu komerca letero en la Franca al iu malkontenta kliento estis vere pli ol nur amuza. Memkompreneble Davido estis plendinta al Luko pri tiu lingva barilo, sed tiu simple ridegis, dirante - ke li promesis trilingvulinon, kaj jen ja trilingvulino. Davido plej bone sen prokrasto kontentiĝu. La cetero estos la problemo de Davido! Luko estis fininta sian prediketon per la vortoj, „Kaj entute, ĉu ŝi ne estas bela museto?”

La slipo ne troviĝis. Se „la bela museto” entute estis iam ajn skribinta ĝin en iu ajn el siaj tri disponeblaj lingvoj, ŝi evidente tuj poste en bona spiona tradicio estis formanĝinta ĝin. Davido ekprenis la biletojn kaj la monon kaj rapidis for - flugmaŝinoj ne kutimas atendi.

Li veturis al la Orlea flughaveno Francstile - jen sinonimo por „je plena gaso kaj kun memdetruema kuraĝo limanta kamikazon”. Li fakte atingis sian aviadilon kaj eĉ sukcesis akapari sidejon ĉe fenestro. Baldaŭ li ►



► estis en la aero super la nuboj survoje al nekonata Tunizo. „Nu”, li pensis, „pro kio mi estas direktisto? Evidente pro mia senlima inteligento, mia senlima kombinemo kaj mia senlima lerto.” Tiu iomete malmodesta pensaro konsolis lin, dum li mendis en sia aĉa Franca glason da tomatsuko de la stevardino. Brava Davido eble pli konvene estu konfesinta al si, ke en la tiama momento li estis forgesinta adapti sian vicon da senlimaj naturdotaĵoj al la bagatela fakto, ke Tunizia ministro kutimas paroli la Francan, kaj, ke li, Davido, evidente devos aranĝi kaj demonstracii ĉion en ĝuste tiu lingvo. Plia nepreteratentinda realo estis la manko de tiu slipo. Jen nome ĉiuj liaj rendezuoj, ĉiuj adresoj, ĉiuj personoj kontaktigendaj, ĉiuj doganaj detaloj por la provizora importo de la komputilo kaj lastvice jen la nomo de lia hotelo. Hotelon Davido certe bezonos, ĉar, kiel li povis senpene dedukti de la revena dato de la flugbiletoj, la tuta operaco estis daŭranta plenan semajnon.

Nu, en ĉiu mezaĝa viro dormas ankoraŭ konsiderinda dozo da skolteco kaj evidente en dikventra direktisto estas sufiĉe da spaco por permesi eĉ la dekoblan kvanton kaŝiĝi. Magia genio kaŭris en Davido, jam dum jaroj saltoprete atendante la momenton eskapi de sia flakono. Skoltiĝinta Davido fiere deklamis al si mem, ke iel ajn li certe sukcesos trovi ĉion. Evidente la Tunizia ministrejo pri edukado devos esti sufiĉe facile trovebla. Tamen li direktiste ruze planis komenci ĉe sia nekonata hotelo - eble Kristina estos faksinta iujn detalojn tien. Tiurakontere estas menciinde, ke Davido havis sekretan kontrakton kun Kristina. Ŝi ĉiam enloĝigu lin en la plej luksan hotelon, kiun ŝi kapablas trovi. Memkompreneble tia strebo estis tute kontraŭa al la ekzakte malaj kaj klare vortigitaj instruoj de lia afabla sed iom ŝparema ĉefo Luko. „Tiom da luksaj hoteloj ne povos ekzisti en Tunizo”, li pensis. „Sed Kristinan mi malgraŭe mortbatos!” li afable promesis.

Fakte la tuja dumsekunda mortbato je Kristina estus verŝajne la sola efektivegebla solvo por puni ŝin, ĉar ĉiu alia rimedo principe ne estus aplikebla. Se li kolere aŭ mishumore eĉ nur ekrigardis ŝin, ŝi tuj komencis plori. Kristina estis ankoraŭ tre junulineca kaj iom plorema. Luko, kiu tagmanĝe trinkis ege tro da vino, ofte ofendis Kristinan kaj apartenis al la regulaj devoj de Davido konsoli ŝin kaj trovi de ie ajn aldonajn papernaztukojn. Ĉe tio Davido ofte eĉ ne eksciis la tialon por ŝia lamentado, ĉar ŝi pro honto rifuzis ripeti la maldecaĵon, kiun Luko estis dirinta al ŝi. Nu koncize, tiajn spektaklojn Davido laŭpove klopodis eviti. Alivorte absolute nenio estis okazonta al ŝi, minimume ne tiom longdaŭre, kiom liaj ĵusaj mensaj minacoj ne per iu insida sorĉo senaverte vuduigis.

Fakte Davido estis sufiĉe afabla homo. Li kutimis iom pripatradi siajn sekretariinojn. Reveninte, li certe kiel ĉiam aĉetos por Kristina tagmanĝon, ĉar ŝi kiel praktikanto ricevis tiom malaltan salajron, ke ŝi senĉese troviĝis en stato de persona bankroto. Tian inviton Davido kutimis eklanĉi, postulante de ŝi, ke ŝi nepre akompanu lin, ĉar li sen ŝia helpo ne kapablos malĉifri la menuon. Ĉe tio la ege magra Kristina kutimis - laŭ la takso de Davido verŝajne jam de longe ekkonante lian ĉiutagan mensogeton - rigardi tute esperplene, ĉar evidente jam la matenmanĝo estis mankinta al ŝi. Kiel Luko estis vortiginta la aferon - jen la problemo de Davido. „Espereble ŝi ne mortos pro malsato dum mia tutsemajna malĉeesto!” li iom zorgeme pripensis, suĉante sian pipritan tomatsukon.


\*\*\*\*\*

La flugo al Tunizo estis seneventa. La vetero estis

belega, Alpoj estis belegaj kaj la vido malsupren al Mediteraneo estis belega. Eĉ la Franca manĝo surtabligita - kiel kutime iom stranga afero kun viando ege drakunkola - aperis al li tute belega. Davido kredis, ke tio rezultis el lia situacio. Li nome jam pritraktis la aferon de ĝia sporta flanko. Li apenaŭ parolpova eksterlandano en fremdujo, sen iu informo, sen iu hotelo, sen iu komputilo, sen iuj datumoj pri rendezuoj devos venki ĉiujn problemojn tute per si mem. Jen tasko vere inda je lia direktisteco. Por io ajn li ja gajnu sian iom tro komfortan salajron. Fakte Davido tute entuziasmiĝis pri tiu testo de transvivpovo.

\*\*\*\*\*

La unua problemo de Davido estiĝis sur la sojlo de la flugmaŝina pordo antaŭ la pasaĝera ŝtuparo. En Parizo regis somero kaj la lastaj tagoj estis sendube sufiĉe varmegaj. Tunize oni estis alteriĝinta iomete post la tagmezo. Tio, kio nun embuskis por Davido ĉe la flugmaŝina pordo, tio ne estis iuspeca somero, tio estis laŭ lia identigo la atmosfero de Jupitero. Ĉe tiu ekkono lia unua eraro estis entute enspiri, ĉar poste li tute ne plu kapablis ree elspiri. Nur la premo de la pasaĝeroj malantaŭ li sukcesis ŝovi lian rondan korpon kaj lian kofreton sur la ŝtuparon malsupren. En la atendanta buso ĉiuj gajiĝis, nur ne li. Li batalis kiel fiŝo ekster akvo kontraŭ la malamika klimato de fremda planedo. Normale li ja respondecis pri Skandinavio, ne pri Afriko.



Eble lia persona klimata problemo iomete rilatis al lia figuro. Kiom Kristina estis maldika, tiom Davido estis malmaldika. Iun tagon ili kiel ŝerco estis mezurintaj siajn respektivajn taliojn per mezurbendo. Tiu eksperimento malkovris al la ĉirkaŭaj spektantoj, ke lia pompa periferio relative precize egalas al la adicio de du vespotalioj de Kristina. Tiu mezura rilato ricevis mil flugilojn kaj estis intertempe konata en la tuta firmao.

La flugkampa buso kun batsvingo ekveturis. Ĝi transportis la flugintojn apenaŭ kvindek metrojn kaj denove haltis, oscilante sur siaj risortoj. Kun siblo la pneŭmataj pordoj malfermiĝis kaj la gajularo elbusiĝis. Davido en stato de senfina mizero duone falis, duone rampis post la aliuloj.

„Bonan tagon, sinjoro”, diris la uniformita doganisto, prenante la pasporton etenditan al li.

„Bnan tnon”, eligis Davido, tute nevole strange ĉinece. Je pli liaj voĉaj kordoj ne plu estis kapablaj.

„Komerca vizito”, anoncis la doganisto, profesie taksinte lian kompleton, lian kravaton kaj lian diplomatan kofreton.

Davido ne respondis.

„En kiu hotelo vi tranoktos?” la doganisto afable demandis.

Nu, jen demando sendube sufiĉe interesa. „Dankon Kristina, mi korege kisas vin!” li silente ĵuris. „Evidente tiu doganisto estis samtempe membro de la sekreta polico kaj nun li plenumas iun registaran dekretan detale registri ĉiujn movojn de suspektindaj eksterlandanoj. Angloj kun Germana adreso venantaj de Francujo estis evidente tuj enkarcerigendaj.” Nome specife tia Franca Germana Anglo Davido ja estis.

„Certe en Hotelo Sahara”, la doganisto senpacience respondis al sia propra demando. Davido kuraĝe kape jesis, esperante, ke la doganisto estis pravonta.

„Bone! Paŝu plu!”

\*\*\*\*\*

Ekster la flughavena konstruaĵo estis vico da taksioj. Li envagoniĝis ĉe la unua. Temis pri malnova flave bruna Mercedo. ►

► „Al Hotelo Sahara, mi petas”, li vokis al la taksiisto, preĝante, ke la aŭto senprokraste ekveturos. Nome ĝia sola klimatigo konsistis el ĝiaj ĝis maksimumo malsupren krankitaj fenestroj kaj Davido kalkulis, ke la tuja ekmovo de tiu taksio eble estis povonta lastminute savi lin de lia tute certa forpaso.

„Sahara!” eĥis la afabla Arabo antaŭ li kaj je la feliĉo de Davido per diable alta rapideco ekraketis.

La Araba taksiisto efektivigis sian veturadon kun la maldekstra brako senzorge pendigita el la fenestro en la aerfluo. Lian solan enaŭtan manon li premis firme kontraŭ la butonegon por aktivigi la laŭtan kaj misharmonian kornon. Laŭŝajne li bezonis nek iam ajn tuŝi la levilon por la rapidumoj, nek iel precize direkti sian taksion. Li veturis eksklude hupe kaj pedale.

La vojo inter la flughaveno kaj Tunizo estis sufiĉe longa. Ĝi kondukis kelkajn kilometrojn rekte paralele al la golfa bordo. Al la atmosfero de Jupitero nun aldoniĝis kelkaj tre Teraj odoroj. Evidente Tunizo bezonis ne iujn novajn komputilojn, Tunizo tute urĝe bezonis efikan fekaĵpurigan instalaĵon. Laodoro estis sufoka. Baldaŭ tamen aperis la unuaj plattegmentaj pluretaĝaj konstruaĵoj de Tunizo kaj ili venis al la precipa urbmeza bulvarado. Ĝi estis kvarvoja kun meza laŭlonga stratinsulo kun razeno kaj altaj ombrodonaj palmoj. Estis sufiĉe multe da trafiko.

„Jen Hotelo Sahara!” diris la taksiisto kaj bremsis abrupte apud la trotuaro. Davido pagis lin. Ĉe la flughaveno li estis fakte ŝanĝinta iom da mono, antaŭ ol li stumblis el la endoma ombro en la ardegon de la planedsistema centra stelo. Antaŭ la luksa hotelo staris taĉmento da soldatoj. Iom mirante, li eniris en la akceptejon rekte tra la mezo de la taĉmento. Ankaŭ interne ĉie estis militistoj kun maŝinpafiloj. La militema etoso tamen tute ne ĝenis lin, ĉar tiu hotelo havis unu por li evidentegan kaj decidigan avantaĝon. Ĝi estis plene klimatigita, do Jupitero restis ekstere malantaŭ la precipa enirejo. Davido nun troviĝis en Paradizo.

\*\*\*\*\*

Li alproksimiĝis al la akcepteja tablego kaj alparolis la deĵorantinon.

„Ruselo Davido, firmao T2F, ĉu oni rezervis por mi?” li kvakis France.

„Hmm. Mi ne tuj trovas vin”, ŝi redonis, klavumante ĉe sia komputilo.

„Mi alvenas pro iu afero de la ministrejo pri ...” li komencis klarigi al ŝi. Sed ŝi tuj reagis. „... Ho, pro la ministra konferenco, mi serĉos vian rezervaĵon pli poste. Vi povas rekte iri en la unuan etaĝon. Bonvolu rapidi, la afero jam komenciĝas.”

Post tre agrabla vojaĝeto per la lifto - Davido volonte ŝvebis lifte - li retrovis sin meze de dika longa ruĝa tapiŝo, kondukanta de la lifta pordparo al eleganta ruĝligna pordo. Ambaŭflanke postenis du batalpretaj soldatoj en kamuflaj kostumoj kaj kun oblikve tenataj maŝinpafiloj. Maldekstre de la longa ruĝa tapiŝo sidis ok policianoj grupiĝintaj ĉirkaŭ tableto antaŭ granda fenestro. Iliaj armoj estis apogitaj kontraŭ la apuda muro. Ili babilis. Davido malatentis pri la policianoj kaj alproksimiĝis al la gardata pordo.

„Ĉu la konferenco?” li demandis de la soldatoj.

Anstataŭ ol respondi la du soldatoj en perfekta samtempo kunbatis siajn kalkanojn, svingis sian armon ĝis la ŝultro kaj salutis. Nu, tian reagon Davido ne estis atendinta. Unu el la soldatoj paŝis iom antaŭen, militparade turnis sin kaj kiel meĥanika roboto malfermis la pordon. Davido trairis.

Jen longa luksega iom konservema konferenca salonego. Meze kaj laŭlonge de ĝi troviĝis giganta tablo. Ĉe ĉiu flanko de la tablo sidis vico da Araboj, plej ofte

en blankaj naciaj roboj. Nur ie kaj ie videbliĝis Eŭropstila kompleto. Sume sidis ĉirkaŭ kvindek kaftane vestitaj ŝejkoj ĉe tiu longa mahagona tablo. Kelkaj turniĝis en sia seĝo por ekrigardi la enveninton. Unu el ili febre signis per la mano, ke apud li troviĝis ankoraŭ ne okupata seĝo. Fakte tiu estis la sola ankoraŭ libera seĝo. Evidente oni atendis Davidon. Li ĝisiris ĝin kaj sidiĝis. La alvokinta najbaro indikis la tablomezan pleton kun malvarmaj trinkaĵoj. Davido kapkline silente salutis la kunvenintaron kaj prenis nigre purpuran ribsukon de la pleto. La alia najbaro de Davido, same ŝejkeca, transdonis al li botelmalfermilon. Li iom manipulis, kontente enverŝis sian glason kaj aferece elprenis kelkajn hazarde elektitajn dokumentojn el sia kofreto. Li ja nepre aspektu kompetente. „Nu kara Kristina”, li pensis, „tiel sukcesas direktistoj! Jen Tunizo, jen mia hotelo, jen la konferenco, jen mi kaj jen mia trinkaĵo. Por direktisto jen tute simpla afero.”

\*\*\*\*\*

Kiel komence raportite, pri la Franca Davido ne estis speciale sperta. Se temis pri pure komputilfakaj temoj, nu tiam li pli aŭ malpli sukcesis. Tute ĝenerale legi ankaŭ li sufiĉe bone kapablis, eĉ la utopiaĵojn de Julio Verno. Tamen kompreni flue parolatan Francan jen iom alia afero. Tiumomente parolis tre dika Arabo - kiun Davido tuj pro lia dikeco intuicie ŝatis. Tiu nazalis France tamen kun forta Araba akĉento. Davido klopodis sekvi lian paroladon. Fakte la Arabo pli kaj pli ekscitiĝis pri io ajn. Davido mense batalis kun la malfaciloj de la Franca lingvo. Iom strange iu el liaj kutimaj komputilaj fakvortoj simple ne menciigis. Tute male. En ĉiu tria propozicio aperis minimume unu vorto, kiun Davido tute ne sciis. Iu el tiuj rememorigis lin pri la termino „haringo”. Jen refoje, tute klare - „haringo”. Sed kiel je dudek didoj rilatu haringo al la ministrejo de edukado? Kaj entute kion faras haringoj tiom proksime al la Sahara dezerto? Iom pli poste li sukcese identigis la vorton „skombro” kaj poste sekvis „moruo”. Ju pli la dika Arabo ekscitiĝis, des pli lia afero fiŝece enigmiĝis.

La ŝejko kontraŭ Davido ĉe la alia tabloflanko afable ridetis al li de malantaŭ siaj nigraj sunvitroj. Davido, plu cerbumante pri diversaj fiŝoj, iom gape tamen same afable reridetis. Subite ĝis spina ŝoko trafis lin. Sen iu ajn dubo li estis malĉifrinta la frazon „3-mejla zono” kaj nur sekundojn post tio la frazon „dum tiu tutaraba naciestra konferenco”. Ene de la sekvantaj tridek sekundoj pluraj pliaj lingvaj riveliĝoj klarigis al li, ke li nun partumis en la „Tutaraba konferenco pri internaciaj fiŝadaj rajtoj”! Tiuj tutaj ŝejkoj estis fakte la prezidentoj kaj ministroj de siaj respektivaj ŝtatoj. Nur Davido ne estis rimarkinta tion, ĉar ĉiuj ŝildoj sur la tablo, starigitaj po persono, estis Arabalfabetaj kaj la scion legi la Araban Davido bedaŭrinde ne posedis. En sia nuna ektimiĝo li videble paliĝis. Do tial ĉi la hotelo estis plena je ĝis la dentoj armitaj gardistoj, soldatoj kaj policianoj. Tiuj armitoj sekurigis la gastigatajn ministrojn kontraŭ eblaj teroristaj atakoj! Tamen malgraŭ lia propra embarasego iu mensa diablo instigis Davidon cerbumi pri tio, kiun nacion li tie ĉi ĝuste misrepresentis. Ĉu eble iu nacio grava? Tamen kion fari?

Li rekonsideris sian kazon. Evidente, se li malkaŝos sian sekreton, la sekuriga taĉmento pritraktos lin kiel spionon aŭ atenconton. Li certe ne havos iun ŝancon kredinde klarigi sian eraron. Aldone li estas laŭŝajne senpermesile pasinta tri sekurigajn nivelojn. La fakto, ke neniu haltigis lin, evidente rilatis al lia aspekto. Verŝajne li similas al iu ankoraŭ atendata konferencano. Oni sendube arestos lin kaj, post sufiĉe longa tortura esplor-

► ado, ĵetos lin en iun malluman ĉelon. Eĉ se li iam ajn sukcese konvinkos la esploriston pri la fakta hazardeco de la okazintaĵoj, oni neniam inklinos malkaŝi, ke iu Tunizia elita gvardio simple permesis al li transpasi ĉiujn sekurkordonojn, eĉ ne demandante lin pri lia nomo. „Ho Kristina, kien vi sendis min? Al mia certa ekzekutiĝo!” li mense kriegis. „Kiom vi nun ploru! Luko certe komisiis vin informi mian edzinon pri mia ekzekuto.” La najbaro dekstre de li, transdonante telereton da ĉokoladaj keksoj, kliniĝis al li kaj flustris ion en lian orelon, kion li tute ne komprenis. Ŝoke Davido revekiĝis el sia pensado, prenis la plej proksiman kekson kaj amike dankis.

Kion nun fari? Evidente iam ajn tre baldaŭ estis aperonta la invitile rajtigita posedanto de tiu seĝo, sur kiu li ĝuste tiom komforte sidis. Eble tiu gravulo estis jam antaŭ la pordo kaj jam diskutis kun la armitaj gardistoj. Eble oni jam scias pri la trompo. La korpe sufiĉe peza parolanto intertempe rekte ŝprucigis fiŝojn. Dekojn kaj dekojn da fiŝoj. Davido eĉ ne sciis, ke tiom da manĝeblaj fiŝspecioj ekzistas. Kaj entute, ĉu haringoj kaj skombroj loĝas en Mediteraneo? La tuto ŝajnis esti iu absurda teatraĵo. Sed kion fakte fari?

Helpos ne iuspeca klarigo, li decidis. Estis nur unu solvo. Li simple ekprenu sian kofreton, stariĝu kaj pokervizaĝe eliru el la ĉambro. Sed kio okazos ekstere? Ĉu la soldatoj tuj ne miros pri li kaj iĝos suspektemaj, se iu tiom abrupte forlasos la konferencon? Davido ne sciis la respondon al tiu demando kaj ankaŭ tute ne kapablis diveni la respondon al ĝi. Eble li eĉ ne volis diveni la respondon. La fiŝ-Arabo subite ĉesis vomi marbestojn kaj sidiĝis. Ĉiuj murmuris sian nepran aprobon al liaj fiŝaĵoj.

Davido akorde kunmurmuris ion tute nekompreneblan, eltrinkis sian sukcon kaj fermis lian kofreton. „Nun aŭ neniam”, li pensis.

Mem apenaŭ kredante pri sia propra kuraĝo, li ekstaris, tute normale enmanigis sian kofreton, ĝentile klinis la kapon al siaj du afablaj najbaroj kaj faris same al la kontraŭflankulo. Tiam li senĝene klinis la kapon al la tuta rondo kaj ekmarŝis en la direkto de la ĉiosava pordo. Ĝi ŝajnis esti neatingebla for, necesigante de li paŝon post paŝo post paŝo. Sen rigardi malantaŭ si, li malfermis la pordon kaj elmarŝis.

Ekstere, li simple firmpaŝe plu iris. Malantaŭ si li aŭdis, ke la du gardistoj kunklakigis la kalkanojn kaj li supozis, ke ili denove soldate salutis. Ne kuraĝante rigardi al la gardistoj, Davido afable gruntis iun adiaŭan formulon al la klakigantoj. Samtempe li observis la grupon da policianoj el okulangulo. Tiuj nun kun intereso pritraktis lin. Preskaŭ panikiĝinte, li malaperis en la tute hazarde jam prete atendantan lifton. La aŭtomataj ŝovpordoj helike malrapide fermiĝis. Li kredis vidi tra la lastaj kelkaj centimetroj de la fendo, kiel ĉiuj policianoj saltis al la fermiĝantaj liftpordoj, armon enmane.

\*\*\*\*\*

„S-ro Ruselo! S-ro Ruselo!” vokis la akceptistino de malantaŭ sia tablego, vidinte lin elliftiĝi. „Mi iom telefonadis pro vi kaj mi estas eksciinta de kolemino, ke vi efektive loĝas ne ĉe ni tie ĉi en Sahara. Estas rezervite por vi en Hotelo Interkontinenta! Oni jam atendas vin!”

Sed Davido ne plu aŭdis ion. Li fuĝis jam preskaŭ kure trans la akceptejo, komika figuro kun sia kofreto, sia dika ventro kaj siaj mallongaj kruroj. Nun li alvenis ĉe hotela svingopordo. La akceptistino tamen postkuris lin. Ŝi estis rezoluta persono, posedante gravan sciigon, kiun ŝi estis decidinta ĉiuokaze liveri. Perforte se necese.

„Sinjoro, vi loĝas en Hotelo Interkontinenta”, ŝi senspire stertoris, atingante Davidon meze de la gardista taĉmento sur la trotuaro rekte antaŭ la enirejo. Kiel donaco de iu nekonata pagana dio, staris nigra taksio rekte antaŭ la pordo, eĉ ne metron de li for. Baldaŭ oni alarmos kaj tiuj soldatoj tuj komprenos, ke estas li, kiu fuĝas. Li ne atendis unu momenton pli. Li saltis enen, eĉ ne demandinte, ĉu ĝi estas libera aŭ ne. Tiun tagon Davido efektive havis mirindan bonŝancon koncerne taksiojn. La soldatoj restis ĉeloke.

„Hotelo Interkontinenta! Rapidu!” li ordonis. Du soldatoj nun estis forlasintaj sian postenon kaj danĝere alproksimiĝis.

La taksiiisto faris tamen nenion. „Mia fino! Mia fino! Jen mia fino!” pensis Davido.

„Do rapidu! Ek al Hotelo Interkontinenta!” La du soldatoj rigardis nun scieme tra la malfermitaj taksiaj fenestroj.

„Ĉu vi estas tute certa?” la taksiiisto demandis.

„For! For!” krietaĉis Davido. Nun jam tria soldato el la taĉmento interesate gapis en la taksion kaj Davido jam vidis la aŭroran ekzekutadan taĉmenton antaŭ si. „Ŝargu! Celu! Pafu!” Li jam sentis la kuglojn profunde penetri en sian korpon, ŝirante histon kaj frakasante ripojn survoje por agoniige trabori lian koron. Li terurigiĝis.

„Sed estimata sinjoro, Hotelo Interkontinenta estas...”, afable respondis la taksiiisto kaj brake indikis el la stratflanka fenestro, „... tie rekte ĉe la alia flanko de la strato! Ĉu vi ne vidas ĝin?” La du hoteloj efektive strate kontraŭas sin. „Vi do plej konvene iru piede!”

Davido preskaŭ svenis. Apenaŭ rekonsciiĝinte, li eksaltis el la taksio ĉe ĝia stratotrafika flanko kaj zigzakis for, postlasante nodiĝon da laŭte hupantaj aŭtoj.

„Tiuj Eŭropanoj estas vere strangaj!” komentis la taksiiisto. La tri gardistoj ridis. Dume Davido estis jam malantaŭ la ombra stratinsulo kaj dancis inter la bufroj de la aŭtoj sur la alia flanko de la bulvardo. Li troviĝis jam pli ol duonvoje laŭire al sia nova klimatigata haveno.

\*\*\*\*\*


Kristina, ĵus fininte sian matenan lernejon, staris nun sola en la oficejo. Ĉe la ekrano de la komputilo de ŝia ĉefo pendis ankoraŭ la paperfolio, kiun ŝi estis skribinta la antaŭan tagon. Por la pretigo de la folio - slipo ja ne estus sufiĉinta - ŝi fakte devis labori plurajn horojn kaj multe telefoni Tunizien. La ĝisfine redaktita verko entenis pli ol dudek erojn kaj estis ambaŭflanke dense tajpita. En ties dekstra supra angulo estis kvar centimetrojn larĝa dika ŝoke ruĝa stelo desegnita per tre dikpinta feltskribilo. Ŝia stelo minacis venene kiel iu granda en sango trempita araneo el tropika arbarego. Davido ja nepre vidu la folion pendigitan antaŭ lia ekrano. Ĝi estis efektive sufiĉe videbla. La dolarojn kaj la biletojn ŝi estis metinta apud la klavaro de Davido, sed tiuj estis nun for.

„Nu”, ŝi pensis, „Davido evidente enmemorigis ĉion! La folion li eĉ ne bezonis kunpreni! Fulmotondron!”

Post iom da cerbumo ŝi konkludis, ke direktistoj principe devas ja kapabli tiaĵojn. Eĉ se ili ĉiuj estas ja frenezaj. Dum la spontanea nasko de tiu nova filozofia maksimumo pri direktistoj la intestoj de Kristina, iom premiĝe enspacigitaj inter ŝiaj plej malsupraj ripoj kaj ŝia famiĝinta vespotalio - cetere dekorata per ĉarma umbiliko, kiun ŝi tiam aerumadis en la oficejo spite al la ebria kaj atencema Luko - pro la atendota malsato grumblis mallaŭtan proteston. Ŝiaj intestoj iel sentis, ke Davido ne tiom baldaŭ estis revenonta.

\*\*\*\*\*

Sur la tegmento de Hotelo Sahara ekhurlis sireno. ■



# Historia romano pri Jesuo

La unua afero, kiu ĉe ĉi tiu libro tiras la atenton, estas la ŝajne renversita titolo. Kiu nur iomete scias pri Jesuo, tuj atendus „la tago kiam Judaso perfidis Jesuon”. Sed ne, ĉe de Seabra estas inverse.


La vera romano komenciĝas per *Epilogo* – preskaŭ duonlibra –, kiun sekvas *Prologo* iom pli longa. Unupaĝa *Daŭrigo* finas la verkon – krom kelkaj utilaj glosoj. Ĉe de Seabra ja ĉi-libre inverse, ĉu ne?

## La nomoj

Kiom mi memoras, la nomo Jesuo ne renkontiĝas en la romano mem, nur en la titolo. Interne li ĉiam nomiĝas, multe pli aŭtente, Jehoŝua bar-Jozefo, kvankam pri tiu „bar-Jozefo” (= filo de Jozefo) eblas iom diskuti. Laŭ kelkaj fakuloj, lia patro ja supozeble mortis tiel frue, ke efektive Jesuo estis konata nur kiel „filo de Maria” aŭ pli aŭtente „filo de Marjam”. Ankaŭ en la Nobla Korano oni titolas lin tiel.

Tiu maniero nomi la ĉefpersonon ne per la nuntempe plej konata nomo, Jesuo, sed per tiu aramea nomo Jehoŝua, estas karakteriza por la verko: Jerusalemo nomiĝas hebree *Jeruŝalaim*, dio nomiĝas plej ofte *Adonaj*, kamparanoj estas *Barjonim* (pluralo de *Barjona*), Jakobo estas *Ja agob-El*, Egiptio estas *Misraim* – kvankam eble estus ankoraŭ pli trafe, se la aŭtoro uzus tie *Micraim*, sed tio estas detalo. Kaj tiel plu. Do, entute: Manuel de Seabra tre atentis pri nomformoj, kiuj impresu aŭtentaj. Prave, mi aplaudus.

Sed, bedaŭrinde, ĉe kelkaj pli konataj virin-nomoj tiun principon li forgesis apliki: sur paĝo 7 troveblas kaj Elizabeto kaj Marjam; unu en la origina formo: ja ankaŭ en la greka teksto de Nova Testamento, Maria plej ofte nomiĝas Marjam – kaj la alia kun strange balasta, alkroĉita -o, kvankam jam de post la 30aj jaroj, danke al Kalocsay, estas kutime ne plu uzi la o-finaĵon por inaj nomoj. Iom pli poste renkontiĝas Judita, kun aldonita -a! Kial tia variado? Kaj sur p. 80 eĉ renkontiĝas preskaŭ unuspire la famaj patrino kaj filino Herodiaso kaj Salomea. Kial ne Herodias kaj Salome, aŭ eventuale



Herodiasa kaj Saloma? Sed sufiĉe pri la formoj de la nomoj. Entute: estis ege plaĉa ideo de la aŭtoro, ĝenerale preni la pli originajn nomo-formojn: tio vere kontribuas al sento pri aŭtenteco.

## Kion rakontas la verko

Unue grava antaŭaverto: Manuel de Seabra verkis nek spe-

cife por religiuloj, nek por ne-religiuloj. Li simple verkis tiun ĉi romanon por homoj, kiuj ŝatas legi bonstila kaj atentokapte verkitan historian *romanon*.

La historio meza-agade ekestas, brilflue disvolviĝas tiel vivece, kvazaŭ ni okulatestus en tiama Jeruŝalaim: la homoj ne estas priskribataj, ili agas, ili moviĝas, kolore, sonore, eble eĉ ĝene brue. Ni kuntreniĝas de stadio al stadio ekde la konsterniĝo ĉirkaŭ la jesua vipado de komercistoj en la templo, lia arestiĝo, pridemandadoj jen de la Sinedrio, jen de Pilato, jen de Herodo – ni sentas, kion sentis la tiutempaj simpluloj, apenaŭ konsciaj, ke okazas ĉirkaŭe io mondoskua – ni aŭdas, kion diras la plej intimaj amikoj, kunuloj, kunkonspirantoj de Jesuo, apenaŭ sufiĉe grandnombraj por insurekcio, tamen emaj riski sian ekziston, ni atestas ilian hororon kaj tiel plu.

Manuel de Seabra ne ŝparas sian aŭtoran vervon. Li nin tuŝas. Kaj ĉe la kulmino, tute nature fariĝas necese starigi la demandon: kiel povis okazi tiu katastrofo? Jen la nun neevitebla *Prologo*.

Kaj de post la junaĝo ni sekvas la adoltiĝon, edukiĝon, vokiĝon de Jesuo, lian agadon, liajn planojn, aspirojn, kiel li fondas grupeton, movadeton multpromesan por estontaj generacioj.

Mi ne malkaŝos, kiu perfidas, kaj kiamaniere. Tion prefere vi mem legu.

## Kion diras la teologo?

Ĉar mi estas ankaŭ teologo, mi ne povis legi tiun ĉi libron neglektante ĉi tiun mian flankon. Foje mi estas agrable surprizita de certa teologia naiveco. Ja jam ekde la 19a jarcento (Albert Schweitzer jam verkis brillan kompendian studon pri

la fenomeno, kvazaŭ retrorigardante al historia epizodo en la teologia studado finfare fermita! Ho brila naivo!), sed precipe en la lastaj dudek-tridek jaroj aperis tiom da „skuaj” kaj „ankoraŭ pli skuaj” studaĵoj pri la „plej efektive historia” juda Jesuo, ke por mi estis certa senpeziĝo legi ĉi tiun libreton, kiu traktas pri liaj vivo, agado kaj mesaĝo, kvazaŭ ĉion ni senprobleme *scius*. Kutime ĉe la fakuloj oni ekhavas la impreson, kvazaŭ preskaŭ nenio plu estus certa, por kelkaj – jam ekde la 19a jc – eĉ ne certas plu, ĉu Jesuo mem entute vivis, fizike, historie. Pri tiaj duboj, ĉe de Seabra, neniu spuro: Jesuo eĉ – sen ajna teksta aŭ teksthistoria problemo – simple prononcas multajn tekstojn el la malsamaj evangelioj, tute laŭlitere.

Tamen, la aŭtoro prezentado de la historio pri Jesuo ne identas je tiu de la sinopsaj evangelioj (Marko, Mateo kaj Luko) nek je tiu de Johano, kiu ja multdetale tiom malsamas disde la sinopsa triopo. Por Manuel de Seabra, kaj por tio li certe havas siajn antaŭpreparajn studaĵojn, Jesuo fundamente estis disĉiplo de Egiptio. Kiel infano, li kun la gepatroj fuĝis tien; tie li estis edukita; lin formis la multmiljara egipta saĝeco, la tiea heredaĵo de teologia-koncepta kredo pri unusola dio, malgraŭ la multdieco de la egipta panteono, kiun oni plu uzadis por ne konfuzi la simplulojn, ĉar tempe de Aĥnaton jam konstateblis, ke la egiptaj felahoj kaj iliaj edzinoj ne komprenas tian „abstraktan diaĵon”. Tiu ĉi tezo nuntempe en kelkaj rondoj estas iom populara. Ĝia forta flanko estas, ke ĝi nek estas pruvebla nek perpruve kontestebla.

Persone, mi ne kredas ĝin; laŭ mi la agado de Jesuo estas tute komprenebla el lia nura juda fono. Sed ja ne temas pri teologia studaĵo. La aŭtoro de romano havas la rajton preni sian propran elirpunkton. Kaj amiko de Seabra tion brile malvolvis.

## Kelkaj fingroglitoj

Kiel en ĉiuj iom grandaj verkoj, troviĝas ie-tie fingroglitoj. Sed tiuj kutime ne ĝenas la agrablan legadon. Tamen, la Asmonea Palaco (p. 17) estu Hasmonea.

Entute: bona riĉigo por nia literaturo, plaĉe leginda verko. Dankon al la aŭtoro.

Gerrit BERVELING

Manuel de Seabra: *La tago kiam Jesuo perfidis Judason*. Eld. IEM, Wien, 2001. 135 paĝoj. Prezo ĉe FEL: 11,10 eŭroj + afranko.

# Iluziaj estas oniaj iluzioj

*Jurgen* estas la plej bone konata romano en la 18-voluma serio *Biografio de la vivo de Manuel*, verkita de James Branch Cabell. Cabell (1879-1958) estis tre filozofiema usona verkisto. La romanon majstre tradukis en Esperanton nia literaturisto William Auld. Pri la traduko mem, menciindas nur, ke mi ne trovas kritikindaĵojn en ĝi. Ĝi estas klara, belsona, kaj fidele redonas la guston de la originala stilo de la romano, aperinta en 1919.

Fantaziaĵo diferencas de sciencfikcio laŭ tio, ke ĝi ne pretendas esti versimila, ĝiaj eventoj kaj rolantoj estas neblaj, pli ĝuste, ofte maleblaj, kion rimarkas pri si kaj siaj spertoj la rolantoj en ĉi tiu romano mem. En *Jurgen* troviĝas amaso da legenduloj, mitologiuloj, kaj uloj plene elpensitaj de la aŭtoro mem. Plejofte, kiam Cabell konigas tian ulon al ni, li ebligas, ke ni vidu ne nur ĝian publikan aspekton, sed ankaŭ ĝian privatan „realan” karakteron. Ĉu iam vi volis koni pli intime Helenan de Trojo, aŭ Koŝĉej la Senmorta-n? Nu, vi trovos multon, pri kiu klaĉi, dum via legado.

*Jurgen* estas lombardisto, edziĝinta al tre ordinara, nebela, kritikema, kaj



amoplenu virino. Kompreneble, li revas pri aliaj pli idealaj kunulinoj, ekzemple, lia unua amatino, kiun li multe amis, kiam ŝi estis 17-jara, sed kiu poste edziniĝis al riĉa malplaĉulo. Dum mistera ekskurso li vagas en kavernon, kaj tie renkontas Kentaŭron, kaj ekde tiu momento ĉio ŝanĝiĝas. Li eniras la universon de iluzioj, mondo kiu ekzistas, ĉar dum vivas iluzioj en la homaj mensoj, tiuj iluzioj ekzistas ankaŭ metafizike; kaj ili mortas, kiam ili forgesiĝas inter la homoj. Do la 17-jara knabino, kiun iam li amis, ankoraŭ vivas, sed ŝi ne rekonas lin, ĉar li aĝiĝis, dum liaj imagoj restis neŝanĝiĝintaj.

Li renkontas la mitologian estrinon de la tempo, kiu redonas (kontraŭ prezo) al li lian junecon, kaj li decidas ŝanĝi la historion. Li sukcesas pri tio, sed tre fuŝe. Seniluziĝinte pri sia iama amatino, li komencas serĉi kaj sperti siajn aliajn amatin-figurojn, kaj tion farante, li ekkomprenas, kiel iluziaj estas oniaj iluzioj. Li trairas Inferon, poste Ĉielon, renkontas la konserv-kristanan Dion,

eĉ la plej superan superdion Koŝĉej la Senmorta, kiu faris la aferojn tiaj, kiaj ili estas. Ĉie la realo montriĝas multe malpli alloga, ol oni supozus.

Demetinte la romanon, post la legado, oni havas multajn ideojn pri pensindajn. Do sukcesa verko, kaj nova gemo por nia literaturo.

Donald BROADRIBB

James Branch Cabell: *Jurgen*. Tradukis el la angla William Auld. Eld. Sezonoj, Jekaterinburg, 2001. 237 paĝoj. Neniu ISBN indikita. Prezo ĉe FEL: 18,00 eŭroj + afranko.

## Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko  
<http://retbutiko.esperanto.be>

### 1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR

### 2 Anna Löwenstein

dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

### 3 K.J.K. Vroegop

Johano Prezo: 7,50 EUR

### 4 Ulrich Matthias

Esperanto: la nova latino de la eklezio Prezo: 7,95 EUR

### 5 August Vermeylen

La migranta judo Prezo: 8,00 EUR

### 6 Lena Karpunina

La bato Prezo: 12,00 EUR

### 7 Peter J. Tomson

La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

### 8 Leopold Vermeiren

Brulanta kastelo Prezo: 3,00 EUR

### 9 Pasporto al la tuta mondo

(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR



### 10 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck

Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR

Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Fakse: + 32 3 233 54 33

# Atrakcio por lingvoŝatantoj?

Mi havas pasivan konon de la hispana kaj nederlanda, sed la rusa estas mia gepatra lingvo. Jen unuafoje en mia vivo mi renkontis libron kun kombino de tiuj ĉi tri kaj Esperanto aldone.

La aŭtoroj mencias, ke ili ambaŭ de junaĝo parolas Esperanton. Kaj ili prave supozas, ke inter esperantistoj ekzistas homoj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri lingvoj, pri ties internacia uzo kaj diversaj aspektoj. Tial ili verkis libron pri siaj lingvistikaj esploroj, esperante ke ni kunsentos ilian fasciniĝon pri lingva tempoekskurso.

Temas pri la epoko antaŭ la fama rusa caro Petro la Granda. *Vestikuranty* estas la nomo de la unuaj mane skribitaj rusaj gazetoj, kiuj dum pli ol 100 jaroj estis farataj en la diplomacia kancelario en Moskvo. La

gazetoj enhavis plejparte tradukojn de okcident-eŭropaj presitaj tekstoj. Ofte, la okcidentlingvaj fontoj (germanaj, nederlandaj, svedaj, latinaj k.a.) uzitaj en Moskvo estis siavice jam tradukitaj de aliaj lingvoj. Do, ŝancoj de fuŝa tradukado multobliĝis, ja tiam ekzistis nek vortaroj, nek norma ortografio, nek stabila gramatiko. Kaj la tradukataj tekstoj mem

estis fojfoje apenaŭ kompreneblaj, kun amaso da latinaĵoj, kompost-eraroj kaj malfacile distingeblaj gotikaj literoj.

Unuvorte, tiu ĉi libreto esploras, ĉu la rusaj tekstoj estis fidindaj tradukoj.

Honeste dirante, mi ne povas aserti, ke la libro potence ekposedis mian tutan atenton kaj ke mi avide glutlegis ĝin. Tamen, samtempe oni ankaŭ devas agnoski, ke la enhavo de la libro tute ne estas ĝangalo de lingvistikaj terminoj kaj la teksto estas glate kaj agrable legebla.

La lingvistika parto estas antaŭklarigita per historia noto. Kun plezuro mi revivigis ion el la malmulto, kion mi ankoraŭ memoras pri la rusa historio el la lernejo. Eĉ pli interese estis legi pri la tiamaj Nederlandoj, ja la rusaj kaj nederlandaj rilatoj poste estis fame evoluigitaj fare de Petro la Granda. La Nederlandoj (*los payses Vajos* – „la landoj basaj”, pli-malpli la nunaj Neder-

lando, Belgio kaj norda Francio) estis liberema unio de provincoj en la 16a-17a jarcentoj. Kun la Provinco Holando ĉe la gvido, ili post plurjaraj bataloj abortigis la aneksajn pretendojn de la hispana reĝo. Finfine, pactraktato estis farita.

Kaj la Prokuro de la Hispanaj Senditoj, dokumento rilata al la pactraktato, estas en la fokuso de la aŭtora esploro.

Rimarkeble, la scio de la aŭtoroj pri la temo estas mirinda – mi apenaŭ kapblas legi la rusan tekston de pli ol tri jarcentoj de aĝo, des pli en la tiama skribo. Sed dum la legado mi tion ne sentis. Male, mi ĝuis, ke mi povis leĝere sekvi la aŭtoran interpretadon de ne tute facile rekoneblaj vortformoj. Ankaŭ la tiama nederlanda aspektas ekzotike,

ekzemple: *ende de ghene die daer van haren oorspronck hebben* – kaj mi tion komprenis danke al la aŭtoroj! Mi ne scias, kiel tio aspektas por iu alia, sed por mi tio vere estis la ĝuo de la lingva tempoekskurso.

Nur kelkaj finaj komentoj: – Kiam sur paĝo 14 mi stumblis je la siglo RGADA – nur kun peno mi konjektis, ke ĝi estas paŭso de la rusa siglo sig-

nifanta „rusia ŝtata arkivo de antikvaj aktoj”; – Nur en la finaj notoj mi eksciis, ke ie troviĝas tabelo de la antikvaj rusaj literoj – kial tion ne indiki ie pli frue en la teksto? – Kelkaj lingvaj specifaĵoj, kiel „atrakcia fonto”, „familiaraj kun la lingvoj”, „forĵuris la reĝon (ĉu abdikigis?)”, „du tradukistoj estis envolvitaj” (tre angle, ĉu ne?), – ne malhelpas komprenon kaj parolece variigas la tekstofluon.

Konklude, mi ne tre kredas, ke la libro estos absolute alloga legaĵo por tiuj, kiuj ne konas ĉiujn tri lingvojn, precipe la rusan – sed, ke ĝi estas inda frandaĵo por la vera lingvoŝatanto, pri tio mi estas tute certa. Sergej DEREVJANNYĤ

I. Maier, W.F. Pilger: *Duamana traduko por la Rusa Caro. Pri 17a-jarcentaj novaj tradukoj en Vesti-Kuranty*. Ilustrita, kun faksimiloj. Eld. Vulpo-Libro, Lelystad, 2000. 95 paĝoj glue binditaj. ISBN 90 70074 42 7. Prezo ĉe FEL: 7,20 eŭroj + afranko.



**Caro Aleksej Miĥajloviĉ:** kontaktoj kun Okcidento.

## Romano el la flandra literaturo

En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historia periodo, tiu de la Nazaretano. Tiel, li reduktas siajn spertojn al simbola rakonto, transportante vivon kaj strebadon de individuo al nivelo universala. Li donas al sia rakonto filozofian substraton kaj en tiu maniero levas ĝin al tuthomara realeco.

La migranta judo



Paĝoj: 72; ilustrita; 21 cm; vinktitaj;  
Prezo: **8,00 €**

Informoj:  
tlf. +32 3 234 34 00;  
tlk. +32 3 233 54 33;  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

Ĉie  
laŭdata

**Esperanto**

SENDEPENDA

**SUBTEKSTE**

PAROLIGAJ KAJ PERFEKTIGAJ  
EKZERCOJ


d-ro Paul Gubbins

Flandra Esperanto-Ligo

Antverpeno 1999

Prezo: 12 EUR

# Ĉelarenigmo



Komenco de ĉiu vorto estas en la parto, kie troviĝas sageto. Skribu la vortojn en la direkto de horloĝa montrilo. Bonvolu sendi la tutan solvon antaŭ la 16a de januaro 2002 al nia redakcia adreso: *Monato* (Enigmoj) Frankrijklei 140 BE-2000 Antwerpen Belgio aŭ rete: [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be)

1. Frukto de dorna arbo (R)
2. Adverbo, signifanta en nenia maniero
3. Ornami per lumiloj okaze de iu festo (R)
4. El grupo de aĵoj aŭ homoj preni ion aŭ iun pro prefero
5. Genro de herboj kaj malgrandaj arbedoj el la familio kaporacoj
6. Speco de agato kun helaj kaj malhelaj vejnoj
7. Acida frukto (R)
8. Daŭre disigi ion, sed ne per tranĉado (R)
9. Firme esprimi sian volon (R)

(R) = radikvorto

K. ECKSTADT, Germanio



## Ne forgesu indiki vian preferatan premion:

- 1) **Plena poemaro** (Eŭgeno Miĥalski)  
La plenan poezian verkaron de tiu ĉi rusa aŭtoro forte influis la komunisma idearo.
- 2) **Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ** (Adriaan Roland Holst)  
Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, perleto de la nederlanda literaturo.
- 3) **La ludanta lumo** (Leopold Vermeiren)  
Ĉarmaj erotikaj rakontoj.

## Solvo de julio

Deko da legantoj (precipe germanaj) bone solvis la ferian enigmon julian dum ke nur kelkaj faris eraretojn. Eble multe da miris pri la verboformo gladigas sed ja temas pri viro kiu pensas ke li estas progresema. La jenaj personoj gajnas premion, Malcolm Jones (Britio), Fritz Lautenbach (Germanio) kaj Wilhelm Schmid (Japanio). Al ĉiuj mi gratulas.

- HEROLDISKONIGI
- UNUNIKA
- VARMALVARMA
- BRAKORPO
- EGETE
- PLUVETERO
- ITALIRLANDO
- HARPIANO
- PURPURUĜA
- KUGLOBUSO
- NASKIGRAVEDA
- RIVEROJO
- SABLARGILO
- ZUMUŜO
- ORARĜENTA
- KORPULENTASVELTA
- KUNIKLUPO
- ITATA
- KONKRABO
- KRUROSTO
- KRIMURDO
- RAŬPAPILIO
- SONĜUTOPIO
- EKSCITRANKVILA
- LEKCIINSTRUI
- PULIBELO
- MUZIKOPERO
- IRANEPALO
- GRAMETRO
- EGALIDENTA
- FROSTIGLACIO
- OKULENSO
- ANGLARABA
- HARDURA
- RELIGISLAMO
- FLUGRUO
- JUNAĜA
- FLOSINKI
- FENKOLEGOMO
- PROKSIMAPUDA
- BASBALUDO
- DONACEMAVARA
- BLOVENTO
- PRESINKO
- MORTEESTAMENTO
- RADIANTENO
- NOVAJURNALO
- DUONOKA
- BOJELPO
- BALONAVIGADO



# Monato

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

**Eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be  
TTT: <http://monato.esperanto.be>  
Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

**Ĉefredaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg.  
Retpoŝto: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com)

**Redakcia sekretario:** P. Peeraerts.

**Reviziantoj:** Hector Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Alexander Schlafer, Katalin Kováts, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

**Grafiko:** Hugo Fontyn, Jean Pierre VandenDaele, Guido Baeyens.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



## MONATO - redaktoroj

**Arto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.  
Reta adreso: [desperanto@mtu-net.ru](mailto:desperanto@mtu-net.ru)

**Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio.  
Reta adreso: [rotsaert@esperanto.be](mailto:rotsaert@esperanto.be) (nur askiaj dosieroj!)

**El mia vidpunkto:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.  
Reta adreso: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com)

**Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio.  
Reta adreso: [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be)

**Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

**Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.  
Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

**Komputado:** Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL.  
Reta adreso: [edmund@rano.org](mailto:edmund@rano.org)

**Leteroj:** Aimo Rantanen, Haapalammentie 13 as 6, FIN-40800 Vaajakoski.  
Reta adreso: [monato-leteroj@fel.esperanto.be](mailto:monato-leteroj@fel.esperanto.be)

**Libroj:** Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono.  
Reta adreso: [kolker@stratos.net](mailto:kolker@stratos.net)

**Noto:** Librecozojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

**Lingvo:** YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.  
Reta adreso: [syama@dokkyo.ac.jp](mailto:syama@dokkyo.ac.jp)

**Medio:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.  
Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com)

**Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo.  
Reta adreso: [mattos@super.com.br](mailto:mattos@super.com.br)

**Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com)

**Scienco:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.  
Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)


**Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando.  
Reta adreso: [gerrit.en.madzy@planet.nl](mailto:gerrit.en.madzy@planet.nl)

**Sporto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.  
Reta adreso: [desperanto@mtu-net.ru](mailto:desperanto@mtu-net.ru)

**Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.  
Reta adreso: [smaul86150@aol.com](mailto:smaul86150@aol.com)

**Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.  
Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)


Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.



## Necesa instrukcio

Nia pola leganto Stanislao Ŝmigielŝki en la Urba Muzeo de Vroclavo ŝtelobservis mirindan instrukcion pri uzado de necesejo. Ĉar ĝi povas esti modela por ĉiuj muzeoj de l' mondo, sube vi trovas Esperanto-version de tiu ĉi epokfaranta verko.

1. Necesejo ĉiam devas esti prizorgata en pureco.
2. Oni devas ne ĵeti rubaĵojn, ĉifonojn, cigaredstumpojn, alumetojn kaj manĝaĵ-restaĵojn en la defluilon.
3. Oni devas ne eniri per piedoj en la pelvon, sed sidadi tiel ke la pugo tute kaj ekzakte adheru al la ringo de neceseja seĝo. Torso devas esti kurbigita kaj pezpunkton oni devas transporti de piedoj al sidvangoj, metante manojn laŭlonge de genuoj. Oni devas sidi tiel, ke fekaĵo falu en la defluilon kaj ne sur sidilon, samtempe oni devas klopodi ne malsekigi tiun ĉi per urino; tiucele oni devas teni la urinorganon, direktante ĝin al la defluilo.
4. Uzante la necesejon por pisado, oni proksimiĝu kiel eble plej multe, palpante la pelvon leĝere per genuoj, kliniĝu antaŭen eligante la urinorganon, klinu ĝin malsupren kaj elpremu urinon ĝis lasta gutu. Oni devas ne foriri antaŭ totala finiĝo de eligo de urino, por ne disŝpruci ĝin sur plankon. Tiel planko ĉirkaŭa estos seka!



## Telefonaj akuŝoj

**A**nkoraŭ antaŭ 15 jaroj, kiam aŭ ton en Litovio oni povis akiri malfacile, precipe viroj ĝojis pri ĉi tiu teknika miraklo. Verŝajne pro sia amo al ĝi, pli da tempo viroj ĉeestis kun la aŭto ol en sia familia rondo. Verŝajne pro ĵaluzo virinoj sarkasmis: „Viroj eĉ en necesejon veturas per aŭto.”

Tamen ŝanĝiĝas la tempoj, venas novaj modoj. En nian vivon venis ankoraŭ unu teknika miraklo – poŝtelefono. Al ĝi homoj tiel al kutimiĝis, ke ĝin kunportas en necesejon, dum manĝado metas ĝin apud telefono sur la tablon kaj domante ĉe la lito. Viroj ne veturas al fiŝkaptado sen poŝtelefono, kaj virinoj – jes, okazas! – sen ĝi eĉ ne povas akuŝi.

Leviĝas natura demando: por kio estas bezonata telefono dum akuŝo? Al tio virinoj respondas precipe strange: „Eble io okazos.” Interese, sed kia ankoraŭ pli neprokrastebla afero povas okazi dum tia grava proceso?

### Monologo

Jen al modelino Renata dum tia serioza momento telefonis iu tre babilema kaj agema virino el moda medio kaj komencis mitrali! Pri modelinoj, kontraktoj, mono, konkurenco. Senŝance iel enmiksiĝi en la monologon. Iu alia malpli edukita naskantino jam antaŭlonge estus elŝaltinta la telefonon kaj ne atendus finon de ĉi tiu litanio. Tamen Renata ĝin ĝisatendis. Kaj eĉ pacience (kvankam tiumomente al ŝi ne estis facile) al la babilulino klarigis, kie ŝi troviĝas kaj kion faras. Kaj ĉi tiu verŝajne unuan fojon en la vivo eksentis, ke al ŝi mankas vortoj.

Alia agema virino, aŭtorino de populara televida programo, Edita, akuŝis ankaŭ kun telefono ĉeflanke. Tiutempe ŝi fariĝis bezonata al kunlaborulo. Kaj tiu labora afero, tre grava kaj senprokrasta, estis deziro ekscii, kiel trovi en Vilniuso iun straton. Edita afable konversaciis, ĉion eksplikis kaj kiam li interesiĝis, kiel ŝi fartas, tre trankvile respondis: „Dankon, bone. Nun mi akuŝas.”

Do, ni vidas, kiel gravas telefono en nia vivo!

Antanas GRINCEVIČIUS

## — anoncetoj —

**Kreu vian propran librokatalogon!** Per la komputila programo de la Retbutiko (<http://retbutiko.esperanto.be>) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu vi deziras libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de ĉiuj haveblaj verkoj de Marjorie Boulton aŭ de Nemere? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo* aŭ kiu estas la eldonjaro de *Murdo en Esperantujo*? Ĉio tio eblas en la retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin. Vi estas bonvena!

**(Re)Abonu FONTO-n!** La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto **FONTO** en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega *fonto* de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

**ESPERANTO**



# Eventoj

aperas dusemajne

pk. 87, Budapest,  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj fakso:  
+36-1-2828885  
[eventoj@hungary.net](mailto:eventoj@hungary.net)

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

## EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.

Petu provexempleron de:

Eventoj

Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario

Rete: [eventoj@esperanto.org](mailto:eventoj@esperanto.org)



## Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Iun tagon, Bruno kaj Maryvonne Robineau forlasis sian farmon en Francio por migri ĉirkaŭ la mondo dum ok jaroj, por iri renkonten al la homoj, dividante ilian laboron kaj ilian ĉitutan vivon.

Ili rikoltas lentajn en hinda vilaĝo, iniciĝas al la ceremonio en Japanio, partoprenas geedziĝfeston en kanaka tribo de Nov-Kaledonio kaj spertas mortminacon en Gvatemalio.

La zamenhofa lingvo malfermis al ili la intimecon de multaj familioj. Bela homkolektado ekde ĉina kamparano ĝis bulgara oficiro, tra hungara instruisto aŭ japana kadrulo.

*Fascina verko, kiu spiras kortuŝan homaramon kaj homecon.*

*(G. MacAoidh en Monato)*

Ili vivis sur la tero. 1998. Mendebla ĉe FEL kontraŭ **17,87 €** + aŭfranko.

## Enkonduko de la eŭro

**Atentu! Ĉu vi ankoraŭ havas frankojn, markojn, ŝilingojn, pesetojn, lirojn, guldenojn, eskudojn, draĥmojn aŭ irlandajn pundojn?**

Kiel vi verŝajne scias, en la 1a de januaro de la jaro 2002 ĉiuj belgaj, francaj kaj luksemburgaj frankoj, germanaj kaj finnaj markoj, aŭstraj ŝilingoj, hispanaj pesetoj, italaj liroj, nederlandaj guldenoj, portugaliaj eskudoj, grekaj draĥmoj kaj irlandaj pundoj iĝos senvaloraj. Finiĝos en tiu momento la transira periodo dum kiu tiuj monunuoj ankoraŭ estis validaj, kaj validos anstataŭe nur la eŭro.

Ĉu vi ankoraŭ posedas tiajn biletojn de iama vojaĝo aŭ kongreso? Estus domaĝe perdi ilin! Por ke tio ne okazu, Flandra Esperanto-Ligo proponas al vi **senpagan** interŝanĝon al eŭroj laŭ la **oficiala** kurzo.

**Kion vi faru?** Kolektu la cititajn monbiletojn kaj sendu ilin en bone fermita koverto, eventuale registrite, al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Vi povas ankaŭ transdoni ilin al oficisto de FEL aŭ en la FEL-libroservo dum la Internacia Festivalo en Germanio (decembro 2001). FEL senpage konvertos la biletojn al eŭroj kaj aldonos tiun sumon al via FEL-konto (se vi ankoraŭ ne havas FEL-konton, oni volonte senpage kreos ĝin por vi). La eŭrojn en via konto vi povos uzi kiel kutime por aĉeti librojn, por plilongigi vian abonon al MONATO, aboni al aliaj revuoj, pagi kongresojn, ktp.

Se restus iuj demandoj aŭ malklaraĵoj, ne hezitu skribi al nia financa konsilisto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be) aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

# Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:  
Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen  
Tel:+32 3 234 34 00  
Reto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:  
81 EUR + afranko  
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:  
81 EUR + afranko  
Prezo de lecionoj 9 ĝis 12:  
81 EUR + afranko

## ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne bremsas la

disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

**Prof. Duncan Charters**

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj